



BRUXELLES
BRUSSEL

ESPERANTO

FEBRUARO 1960

53-a Jaro - N-ro 651 (2)

esperanto

FEBRUARO 1960

53a JARO

REVUO INTERNACIA N-RO 651 (2)

Fondinto : H. HODLER

Honora Redaktoro : HANS JAKOB

Cion por la redakcio oni sendu al la Redaktorino :
S-ino Kirsten Zacho, Randbølvej 4, København, Danlando.

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-2, Nederlando. Telefono : Rotterdam 128313. Ĝirkonto : 378964
TELEGRAMADRESO : ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) **antaŭ** la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A. :

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaron al nia redakcio.

Jara abono (1959) : 9,50 n.gld. (kun membreco kaj jarlibro 12,50 n.gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo 128,— gld 1/2 paĝo 64,— gld 1/4 paĝo 32,— gld 1/8 paĝo 16,— gld 1/16 paĝo 8,— gld

Anoncetoj pri korespondado :

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Legantoj en 80 landoj.

Estraro de U.E.A. :

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chiabrera 37, Torino.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

Prof. D-ro Hideo Yagi, vic-prezidanto, 76 Kawaramachi, Okayama, Japanujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri financoj, 5 Quai Vauban, Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

Norman R. Smith, estrarano pri kulturaj aferoj, 75 South Ealing Road, South Ealing, London W 5, Britujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri eŭropa lingvo-kampanjo, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

A. Rajski, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odyńca 3/5, Warszawa, Pollando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono : ARNold 90-81.

Serva Centro, Palais Wilson Genève. Svislando.

Honora Administranto : Hans Jakob. Telef. 32.30.34.

LA FRONTPAĜA BILDO :

Bonvenon al Bruselo !

Enhavo

Esperanto en la Lernejo	21
Grandiozaj Zamenhof-Solenaĵoj	23
La Zamenhof-Festo en Kopenhago	24
De sube supren	26
La atestantoj	26
Forpasis Prof. Hugo Sirk	30
Radio en Ameriko	30
Infan-desegnaĵoj	31
Jarlibro 1959	38

Rubrikoj :

Internacia Konkurso 1959	22
Mondfamaj Belgoj	25
Tra la Mondo	27
La Juna Vivo	29
Radio-Babiloj	31
Belartaj Konkursoj	32
Novaj Libroj	35
45-a U.K.	38
Oficiala Informilo	39

Manuskripto por "Esperanto" estu liveritaj al la redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare tajpitaj en perfekta Esperanto. Oni skribu sur nur unu flanko de la papero (prefere en normformato A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa margeno maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto. Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn supersignojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

Esperanto en la Lernejojn !

Kiel komunikite en la januara numero de "Esperanto", la Komitato de UEA faris la tagon mem de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof historian decidon pri nova agado celanta laŭgradan enkondukon de la Internacia Lingvo en la lernejojn. La decido de la 15-a de decembro estas bazita sur la Kongresa Rezolucio de la 8-a de aŭgusto 1959, publikigita sur la p. 148 de la septembra numero de "Esperanto". La unua parto de la decido konsistas el la samaj konsideroj (p-toj 1-5), kiujn entenas la Kongresa Rezolucio. La dua parto estas la decido mem, laŭ kiu la Komitato "direktas alvokon al ĉiuj Registaroj plej atente pristudi la eblecon laŭgrade enkonduki la Internacian Lingvon Esperanto en la lernejojn kaj universitatojn kiel devigan aŭ nedevigan lernobjekton; petas ĉiujn interesitajn Registarojn — unuavice la Registaron de P. R. Pollando kiel lando kiu naskiĝis la aŭtoro de la Internacia Lingvo — iniciati traktadojn por subskribo de Internacia Konvencio pri laŭgrada enkonduko de Esperanto en la lernejojn kaj universitatojn, ĉar nur paralela instruado de la lingvo en pluraj ŝtatoj povas doni efikan rezulton; komisiis ĉiujn landajn Esperanto-asociojn transdoni tiun ĉi decidon al siaj respektivaj Registaroj; instrukas la Estraron de UEA entrepreni la necesajn paŝojn por realigi tiun ĉi decidon en la sekvantaj jaroj".

La klopodoj enkonduki la lingvon en la lernejojn ne estas novaj. Jam en la jaro 1905, tuj post la granda sukceso de la Bulonja Kongreso, estis faritaj provoj organizi kursojn de Esperanto en la lernejoj. Kutime oni faris tion en kadroj landaj aŭ eĉ nur lokaj. Utiligante la simpatiojn al Esperanto de iu ministro aŭ de iu loka eduka aŭtoritato, oni proponis kursojn de Esperanto en la lernejoj kaj kelkfoje oni efektive sukcesis enkonduki ĝin, plej ofte kiel nedevigan objekton. Kiel konate, tiun metodon oni aplikadis ekde tiam en diversaj landoj ĝis niaj tagoj. Poste, en la jaro 1920, D-ro Antoni Czubryński, rimarkinte la malavantaĝojn de tiuj klopodoj nur landaj, sen internacia organiziteco, prezentis projekton de internacia agado sur tiu ĉi kampo. La fina celo devis esti subskribo de Interŝtata Esperanto-Akordo pri la enkonduko de la lingvo en la lernejojn. Estis faritaj klopodoj en diversaj landoj, sed oni ne sukcesis atingi la celon.

En la jaro 1937 la ideo estis renovigita kaj la Jubilea Kongreso en Varsovio (1937) havis la lernejan demandon en sia tagordo. Tiukaze D-ro Czubryński verkis specialan studon pri la afero kaj ĝi aperis en la Jarlibro de UEA por la jaro 1937. Bedaŭrinde diversaj malfacilaĵoj kaj la eksplodo de la milito en 1939 malebligis la realigon de la plano.

La restarigo de la Esperanto-Movado post la milito ebligis ankoraŭfoje rekomenci la laboron en la sfero de lernejoj. En 1956 la Komitato akceptis la proponon de S-ro E. Malmgren pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn kiel baza lingvo kaj komisiis lin gvidi tiun kampanjon. Pluraj landoj, unuavice Jugoslavio, atingis belajn sukcesojn, sed ankoraŭ ne estas konata la preciza stato, ĉar bedaŭrinde multaj instruistoj ne respondis ĝis la nuna momento al la du enketoj de CED, kiujn gvidas s-ro D. Kennedy pri tiu demando (vidu la rubrikon de CED en la aprila kaj novembro numeroj de "Esperanto", 1959). Tre verŝajne Esperanto nun estas instruata en almenaŭ 300 lernejoj de diversaj landoj. Tio estas kontentiga en la nuna stadio, sed ĝi estas tamen ankoraŭ tre malproksima ne nur de la ĝenerala instruado, sed ankaŭ de tio, kion ni povus atingi kiel efektive pozitivan rezulton de la jam akiritaj pozicioj en la lernejoj. La ĉefa manko denove estas, ke ni ne agas sufiĉe internacie kaj kunordigite.

La enkonduke menciita decido de la Komitato celas precize tion : utiligante la nunan malstreĉiĝon de la tensio en la internaciaj rilatoj, la fortikigon de la Movado en la lastaj jaroj kaj la jam atingitajn poziciojn en la lernejoj, entrepreni internacie planitan agadon por vastigo de la instruado en la lernejoj kun paralela klopodo ebligi al la gelnantoj kiel eble plej larĝan utiligon de la nova lingvosocio. Temas, efektive, pri grandega nova kampanjo, kiu eble daŭros plurajn jarojn. Estos necese popularigi la ideon inter la esperantistaro, diskonigi ĝin al la larĝaj popoltavoloj, ekinteresi la kulturajn kaj edukajn instituciojn. Aliflanke, nepre antaŭkondiĉo estas firma organiziteco, apogo de ĉiuj Esperanto-organizaĵoj, intima kunlaboro kun la fakaj, unuavice kun ILEI kaj ĝiaj landaj branĉoj. Devos esti organizitaj ankaŭ specialaj internaciaj konferencoj, seminarioj, diskutrondoj. Entute, la taskoj ligitaj al la nova klopodo, se oni deziras sukcese realigi ĝin, estos tre multnombraj kaj postulos multe da laboro, sindono kaj ankaŭ financaj rimedoj. La spertoj de la lastaj jaroj, tute speciale tiuj de la grandegaj kampanjoj okaze de la Peticio al UN kaj UNESKO kaj okaze de la Zamenhof-Jaro, multe helpas la organizon de la nuna kampanjo. Siavice, la disvolviĝo de la laboroj en tiu ĉi speciala sfero tutcerte kuraĝigos kaj la instruistojn kaj la gelnantojn, kiuj jam nun lernas Esperanton en la lernejoj. Tiamaniere la tuta laboro estos harmoniigita, unu klopodo helpas la alian kaj ni paŝon post paŝo iros firme al la nova celo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1959

Stato je la 31-a de decembro

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Hispanujo	1999	2837	141.92
2.	Pollando	6635	9045	136.32
3.	Belgujo	1480	1985	134.12
4.	Finnlando	1935	2515	129.97
5.	Jugoslavio	5690	7155	125.75
6.	Usono	2816	3430	121.80
7.	Italujo	3980	4469	112.29
8.	Danlando	2639	2921	110.69
9.	Britujo	6093	6565	107.75
10.	Svislando	1950	2075	106.41
11.	Germanujo	6951	7240	104.16
12.	Svedujo	6420	6605	102.88
13.	Norvegujo	1991	2035	102.21
14.	Francujo	7066	7111	100.64
15.	Brazilo	8255	8260	100.06
16.	Nederlando	5119	5093	99.49

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Japanujo	1150	2470	214.78
2.	Kanado	435	615	141.38
3.	Argentino	615	815	132.52
4.	Novzelando	878	989	112.64
5.	Aŭstrujo	1360	1425	104.78
6.	Sudafriko	215	225	104.65
7.	Islando	270	270	100.—
8.	Izraelo	255	250	98.04
9.	Portugalujo	615	575	93.50
10.	Aŭstralio	1280	1076	84.06
11.	Urugvajo	325	255	78.46
12.	Maroko	457	256	56.02

Kun grandega plezuro ni gratulas la gajninton de la Unua Konkurso, Hispanujon, kaj precipe nian tiean fervoran kaj modele laborantan ĉefdelegiton, S-ron R. Molera. Li faris vere superhoman laboron, ĉar li atingis ĉi tiun rezulton sub ekstreme malfacilaj cirkonstancoj. Ja en lia lando la valuto estas malforta, ĉiam pli grandan parton de sia salajro devas oferi la hispanaj esperantistoj por la kotizo, kiu donas al U.E.A. tamen nur tre modestan kompenson je tio, kion ĝi liveras : 814 jarlibrajn paĝojn kaj 224 paĝojn de la revuo en la ĵus pasinta jaro. Pluraj malnovaj hispanaj anoj emis rezigni pri membreco pro tro malfacilaj materiaj cirkonstancoj. Kun neestingeblo energio S-ro Molera sukcesis ne nur konvinki ilin, malgraŭ ĉio resti fidelaj al la Asocio, sed ankaŭ varbi konsiderindan nombron da novaj membroj. Tio meritas nian plej varman dankon kaj admiron.

Ekde julio li tenis Hispanujon ĉe la pinto de la Konkurso. En la lastaj monatoj li streĉis ĉiujn fortojn en nobla lukto kontraŭ Pollando, kiu eĉ unufoje saltis al la supra loko, sed devis denove, kaj definitive, cedi la lokon al Hispanujo.

Ankaŭ Pollando, kaj nia tiea ĉefdelegito, S-ro Sakowicz, meritas laŭdon pro sia forta varba laboro kaj bonega rezulto. Ankaŭ la Kongreslando donis ja bonegan ekzemplon al ĉiuj aliaj.

En la Dua Konkurso neatingebla estis kaj restis Japanujo kaj ni varme gratulas al tiu fora lando, kie la movado kreskas kaj floras. Ĝi donas grandajn esperojn por planata iama Kongreso en tiu interesa lando. Plejparte kaŭzis la grandan venkon abunda alfluo de asociaj membroj, sed ankaŭ sentio la unua loko estus atingita.

Varman gratulon meritas tamen ankaŭ en tiu Konkurso la dua lando, Kanado, kiu atingis tre belan rezulton kun 141.38%.

Al la perantoj en ambaŭ gajnintaj landoj estos disponigita librodono en valoro de 100.— gld. por divido aŭ lotumo inter la kunlaborintoj en la sukceso.

Entute, la rezultoj en ambaŭ konkursoj estas ege kontentigaj. En la komenco de la jaro ni esprimis la esperon, ke en la Zamenhof-Jaro ĉiuj landoj pasu 100%. La granda plimulto tion efektive atingis kaj ni ĉi tie kore dankas kaj gratulas al ĉiuj niaj fidelaj kunlaborantoj, kiuj helpis persiste kaj energie.

Ke ĉiuj tiel daŭrigu en 1960 kaj ke la postrestintoj agu laŭ ilia ekzemplo !

La Novaj Konkursoj

En la Nova Jaro la Konkursoj okazos laŭ la sama sistemo. La atingita nombro da poentoj en la fino de 1959 estas la kvoto por 1960. En Konkurso I partoprenas la landoj kun pli forta, en Konkurso II la landoj kun malpli forta movado. La poentoj estas donitaj laŭ jenaj valoroj :

AM = 1 poento; MJ kaj J-MJ = 5 pt.; MA kaj J-MA = 10 pt.; MS = 15 pt.; Pat. kaj DM = 50 pt. Estas avantaĝe varbi multajn patronojn kaj dumvivajn membrojn !

Ek al nova, energia laboro ! Viaj specialaj agadoj en la Zamenhof-Jaro certe faciligos al vi la ĉijaran varbadon !

Grandan sukceson al ĉiuj deziras

M. H. Vermaas,
Direktoro C.O.

LASTMOMENTA INFORMO EL BRUSELO !

Aliloke en tiu ĉi numero aperas la statistiko pri la kongresanoj ĝis la fino de novembro 1959. Antaŭ la limdato por la favoraj kotizoj envenis ankoraŭ centoj da aliĝoj, tiel ke je la momento de presigo de tiu ĉi paĝo la nombro da kongresanoj jam superas 900 !

GRANDIOZAJ ZAMENHOF-SOLENAĴOJ

en Varsovio, la naskiĝurbo de Esperanto

Laŭ propono de la subskribinto la Varsovia Filio de Pola Esperanto-Asocio iniciatis fondon de Ĉefurba Komitato por Omaĝo de la Centa Datreveno de la Naskiĝo de D-ro Ludoviko Zamenhof. En la Komitaton eniris reprezentantoj de Nacia Fronto, Urba Konsilantaro, Verkista Asocio, Profesiaj Sindikatoj kaj aliaj sociaj organizaĵoj kaj de la Varsovia Filio de PEA. S-ro Magistro Zygmunt Dworakowski, prezidanto de la ĉefurba Konsilantaro, fariĝis honora protektanto de la Komitato.

Laŭ iniciato de la Komitato unu el la novaj stratoj proksime al la Zamenhofa ricevos la nomon de Esperanto. Ankaŭ laŭ iniciato de la Komitato unu el la novaj lernejoj situantaj proksime al la Zamenhofa strato ricevos la nomon de la aŭtoro de Esperanto. Laŭ iniciato de la Komitato la Varsovia lerneja Kuratorejo sendis al ĉiuj varsoviaj lernejoj specialan cirkuleron, atentigante pri la Zamenhofa datreveno kaj proponante aranĝi specialajn paroladetojn pri Esperanto kaj ĝia aŭtoro. Dank' al la klopodoj de la Komitato, la 15-an de decembro en la ĉefa poŝtejo funkciis esperanta poŝtstampo. Laŭ propono de la Komitato unu el la fenestroj de la Klubo de Internacia Gazetaro kaj Libro, situanta ĉe la ĉefa strato estis dekorita per bela portreto de Zamenhof, libroj "Doktoro Esperanto" kaj aliaj esperantaĵoj. Ankaŭ la Komitato atentigis la direk-

cion de "Pola Radio" pri la Zamenhofa datreveno. "Pola Radio" kaj varsovia gazetaro multfoje aperigis diversajn komunikojn kaj artikolojn pri Zamenhof kaj lia verko. La plej populara ĵurnalo "Życie Warszawy" aperigis la 16-an de decembro artikolon de Isaj Dratwer: "En la 100-a datreveno de la naskiĝo de Ludoviko Zamenhof". La Zamenhofan Jaron en Varsovio finis la Solena Festvespero aranĝita de la Komitato kaj Varsovia Filio de Pola Esperanto-Asocio kun financa helpo de la Urba Konsilantaro. Jam kelkajn tagojn antaŭ la 15-a de decembro grandaj afiŝoj tra la tuta urbo informis pri la Zamenhofa datreveno kaj la Solena Festvespero. Gi okazis en la plej granda salonego de la varsovia universitato. La festvesperon mal-

fermis s-ro magistro Isaj Dratwer, prezidanto de la Ĉefurba Komitato por Omaĝo de la Centa Datreveno de la Naskiĝo de D-ro Zamenhof, kiu i.a. menciis ĉiujn honorigojn, kiujn ricevis la granda aŭtoro de Esperanto, la modesta varsovia kuracisto.

Post ludo de la himno li tralegis omaĝon al Zamenhof, de la prezidanto de la Urba Konsilantaro, s-ro Zygmunt Dworakowski. En la nomo de la eksterlanda samideanaro parolis advokato Georgios Griniatsos el Ateno, Grekujo. Poste parolis pri Zamenhof kaj lia verko veterano profesoro doktoro Jerzy Loth, kiu persone konis la aŭtoron de la Lingvo Internacia. La Solenan Festvesperon partoprenis i.a. vicministro de Kulturo kaj Arto s-ro Zygmunt Garstecki kaj vicministro de Klerigo s-ro Jan Szkop, reprezentantoj de la Ĉefurba Konsilantaro, sociaj organizaĵoj, diplomataro (i.a. Israelo), aŭtoritatoj kaj multnombre la varsovia esperantistaro. En la riĉa koncerta parto prezentis sin geaktoroj de la Bjalistoka Ŝtata Teatro: H. Bujalska, L. Bijald, J. Dziemski, J. Kleyn; aktorino de Varsoviaj scenejoj: F. Chabrowska—Tiberger; geaktoroj de la Varsovia Operejo: B. Kinasz, J. Granowski, R. Kossakowski (kiu i.a. plenumis "Ho, mia kor"!), E. Pawlak. La varsovia gazetaro, radio, televido raportis.

Isaj Dratwer



De la Zamenhof-Festo en Kopenhago la 15-an de decembro 1959



Prof. d-ro Ivo Lapenna kaj la Ambasadoro de Meksiko, Prof. Aurelio Manrique.



Prof. Lapenna dum la festparolado.




Parteto de la festsalonego.



De dekstre : Prof. I. Lapenna, Ministro Søren Olesen kaj Redaktorino Kirsten Zacho.



La ekonomi-ministro Viggo Kampmann, kiu dumtempe funkcias kiel ĉefministro en Danlando.



La antaŭa parto de la festsalonego.



Petro Paŭlo Rubens

la mondfama artpentristo kaj lia princa domo

La nomo Rubens disradias en la tuta mondo kaj multaj kongresanoj de nia brusela universala, sendube kaptos la okazon pli intime konatiĝi kun la genia pentristo. En la muzeoj de Bruselo kaj Antverpeno kaj en la malnovaj preĝejoj de tiu ĉi urbo ili povos admiri tridekon da pentraĵoj liaj, kaj krome senti la etoson de la domo en kiu li verkis kaj grandsinjore akceptis, kaj kie lia vivosorto plenumiĝis.

Rubens naskiĝis en 1577 el antverpenaj gepatroj en Siegen apud Kolonjo. Li ricevis zorgan edukadon kaj estis jam frue pli ol ordinare naturdotita. Li precipe posedis denaskajn talentojn desegnaj kaj pentrajn. Post la morto de l'patro, Rubens venis kun sia familio al Antverpeno, kie li ricevis instruon de tri pentristoj. Por perfektigi li faris de 1600 ĝis 1608 studvojaĝon en Italujo. Informite pri la malsano de l'patrino, li urĝe sed tamen tro malfrue revenis. Ĝi jam mortis kaj Rubens decidis definitive resti en Antverpeno. Li edziĝis en 1609 al Izabelo Brandt, filino de la urba sekretario kaj aĉetis proprajn en la nuna Rubensstrato. Li pligrandigis kaj precipe plibeligis la domon tiagrade, ke ĝi vekis la admiron de la samtempuloj. La origina posedaĵo fariĝis bela flandra sinjoreca domo kaj servis kiel loĝejo; nova alo kontraŭ ĝi estis starigita sur la korto, kiel fidela kopio de la patriciaj domoj "Palazzi", kiel Rubens ilin vidis, admiris kaj pristudis dum sia restado en Genevo. En tiu alo li instalas siajn pentrejojn. Fine luksa ĝardeno formis belegan fonon por ambaŭ konstruaĵoj.

En sia riĉe instalita domo Rubens akceptis la plej eminentajn personojn sur kampoj beletraj, artaj kaj sciencaj. Ankaŭ diplomatoj, eĉ reĝoj kaj princoj honorigis lin tie per vizito. Nu, li mem estis diplomato kaj, konfidenculo de la arĥidukoj Alberto kaj Izabelo, li estis de ili ŝargita per gravaj politikaj misioj en la eksterlando.

Dume lia aktiveco kiel pentristo estis tiom granda, ke ni ĝin nun malfacile povas imagi. La mendoj alfluis el ĉiuj direktoj. Rubens iĝis la plej grava kaj infua pentristo de la sudaj Nederlandoj. Li laboris helpe de aro da elektitaj pentristoj, kiuj estis ĉu formitaj de li, ĉu verkantaj laŭ lia stilo.

Lia edzino mortis en 1630 kaj Rubens reedziĝis al la tre alloga, juna Heleno Fourment. Kiel kronigo de sia escepta kariero, Rubens kavaliriĝis fare de la reĝoj de Hispanujo kaj Anglujo.

La granda artisto mortis en 1640 en sia domo, kiu en 1946 estis restarigita de la urbo en la origina stato kaj poste konstante malfermita al la publiko.

La Rubens-domo estas konsiderata kiel "vivanta" domo, ekzemplo de flandra patricia loĝejo, do ne kiel muzeo laŭ la ordinara vortsignifo. La internaĵo estas plej bonguste kunmetita. Ĉiu salono kaj ĉambro estas instalita kiel ĝi estis en la tempo de la famega loĝanto, kaj ornamita per artobjektoj kaj pentraĵoj de konataj samtempuloj aŭ kunlaborantoj de Rubens, krom kelkaj aŭtentikaj pentraĵoj de la majstro, ege reprezentaj en tiu medio.

La bela arĥitekturo de la flandra kaj itala renesancaj

konstruaĵoj estas admirinda, speciale tiu de portiko kaj pavilono, restintaj ambaŭ en la origina stato, planitaj same kiel la laborejoj de Rubens mem.

Daŭre impresas al la vizitanto la reĝa aspekto de la domo de l' "princo de la artpentristoj".

Jean Beeckmans



"La adorado de la paŝtistoj". (detalo)

De Sube Supren

Infanoj montras la vojon al siaj superuloj

La instruistaro kaj ĝiaj superuloj plejparte konstruistas Esperanton, kaj plenaĝuloj neniel sukcesas konvinki ilin pri la valoro kaj neceso de nia lingvo. Kial ni ne komencu de sube?

En sudgermana industria urbeto Tailfingen (15000 loĝantoj) la subskribinto ricevis antaŭ unu jaro la permeson de du rektoroj instrui Esperanton al libervolaj gelernantoj. Post 2 monatoj mi, kun subteno de rektoro Karl Wissmann, uzis la bonŝancon prezenti mian Esperanto-klason al la distrikta lernejo-konsilisto M. Haar, kiu kutimas ĉiun trian jaron ekzameni la lernejojn. Li observis mian instrumaterialon kaj malgrandan ekspozicion de esperantaĵoj. Post 5-minuta prezentado de mia instrumetodo la infanoj memstare interpretis vortojn el Esperanto germanen kaj konversaciis inter si kaj kun mi, farante kelkajn dekojn da demandoj kaj respondoj. Per du poemetoj la prezentado finiĝis.

Surprizite la lernejo-konsilisto alrigardis la 20 infanojn, 9 ĝis 12-jarajn, senkulpigis sin pro la nescio de ilia lingvo kaj gratulis ilin pri la sukceso, kuraĝigante ilin daŭrigi la lingvon de l' "paco

kaj amo". Kion mi maljunulo ne estus povinta atingi eĉ per plej belaj kaj elokventaj vortoj, tion senkonscie atingis la infanoj!

Vi demandas, kio sekvis? La infanoj fervore lernis, ĉar mi starigis antaŭ ili allogajn celojn: partoprenon en la Zamenhof-festo, en internaciaj junularkunvenoj, kaj fakte ni sukcesis realigi tion (kunveno dum Pasko sur Feldberg en Nigra Arbaro kaj en Radolfzell apud la lago de Konstanco). Parto de la lernantoj pro la eniro en liceon forestis, sed venis la duoblo de novuloj, instigitaj de siaj kamaradoj. La vorto "Esperanto" sonas nun en ĉiuj niaj lernejoj, kaj la instruistoj ne plu riskas primoki ĝin. Sep infanoj fariĝis JMJ de UEA kaj fiere montras siajn Jarlibrojn al siaj instruistoj. Komence de oktobro nia junulargrupo, en kiu troviĝas 15 infanoj, veturos per 7 aŭtomobiloj al Stuttgart (pli ol 30 personoj), por partopreni tie regionan kunvenon kaj plivigligi tiean junularon. Ni helpu la infanojn. Ili ja estas niaj plej efikaj varbantoj!

W. von der Ley

La atestantoj de la pratempo

La Mineraloj

Nur kun ĝojo oni povas saluti la iniciaton de la esperantistoj en Milano, pri kiu Heroldo kaj Esperanto anoncis. Tiu ĉi iniciato intencas organizi la esperantan lingvon kaj movadon por servi la industrion, komercon kaj turismon, nome tiel praktikvaloran terenon ili volas okupi por la esperanta movado, kiu strikte interrilatas kun la kulturaj kaj ekonomiaj interesoj, kun la helpo de la vivdestino de la homo.

Por neniuj povas esti indiferenta: ĉu sian vivdestinon, ekziston, sciohavaĵon iu povas fari pli rezulta.

La scion ĉiam tio antaŭenportis, ke la homoj publikis iliajn eltrovaĵojn, inventaĵojn, pli kaj pli novajn konstataĵojn starantajn sur fundamento de spertoj. En la publikado de tiaj okazintaĵoj la esperanta movado, la esperantaj gazetoj ĉiam klopodis doni bonan helpon, tiel nia gazeto ankaŭ nun sciigas sian legantaron pri interesa iniciato en Hungarujo.

Estas inde scii, ke Hungarujo estas grava trovejo de materioj gardantaj la signojn de la praestaĵoj. Tiuj ĉi restaĵoj gardis por ni la formojn de la pratempaj kreskaĵoj, arbofolioj, gastropodoj, konkoj, insektoj; ili donas vidigon pri la konstruiteco de la estaĵoj vivintaj antaŭ jarmilionoj kaj prezentas la plej interesajn gradojn de la evoluo.

La trovaĵoj de la hungarlandaj minejoj — krom tio, ke ili enhavas multajn pratempajn signojn — prezentas abundan geologian scion por tiuj, kiuj intencas konatiĝi kun la mineraloj. Eĉ mondrilate estas raraĵoj la hungarlandaj zeolitkristaloj. Speciale valoraj estas la kupritaj, malaĥitaj kaj azuritaj kristaloj kaj kristalaroj, troveblaj en la oksidita zono de la ferminajminejo de Rudabánya. Estas inda por aparte mencii pri la nigraj kalcitoj akom-

panantaj la gangojn de Gyöngyösoroszi.

La opaj trovejoj de la ŝtonkarboj kretaceaj enhavas belegajn fermitaĵojn de sukceso.

Estas atentindaj la naturaj koksformiĝintaĵoj estiĝitaj pro kontakta efiko, la multspecaj andezitoj kaj riolitoj, kiuj estas troveblaj en nekutima riĉeco. La materion de la "hungara arĝento", la baŭksito ne nur la grandaj mezuroj de la trovaĵoj, sed ankaŭ la eksterordinara petrografa diverseco karakterizas.

La nun fondiĝinta societo GEOS en Budapeŝto — laŭ vidpunktoj de eminentaj hungaraj esplorantoj — kunmetis kolektaĵojn enhavantajn multajn pluajn minaralojn; inter ili multaj specoj troveblaj nur en Hungarujo.

Apud la scienca materialo signifaj estas ankaŭ la instruaj kolektaĵoj, el kiuj la "Geolog" nomata jam partoprenas en la trafiko. En ĝia riĉa materialo estas troveblaj 84 diversaj mineraloj, ŝtonformacioj kaj prares- taĵoj, 24-peca eksperimenta kesteto — por pli ol ducent eksperimentoj — kaj abunda ekzerca materialo. Tiel ĝi donas gravan helpon por la pedagogoj en la instruado de la mineralogio.

La diverseco kaj kvanto de la mineraloj kaj fermitaĵoj ebligas ankaŭ valorajn internaciajn interŝanĝojn. Por ke ni helpu ĝin, ni publikas la adreson de la instituto: "GEOS" Scienca Minerala Organo, Budapeŝto (Hungarujo), IX, Dandár utca 24.

Kvankam pri tiuj ĉi kolektaĵoj jam montriĝas granda interesiĝo, ŝajnas ne superflue alvoki precipe la atenton de niaj pedagogiaj samideanoj je tiu ĉi utila kaj valorata iniciato.

Szalay Sándor (Budapeŝto)

Tra la Mondo

Belgujo

"Karlorga Grupo Esperantista, Reĝa Societo" organizis de la 31-a de okt. ĝis la 15-a de nov. la plej gravan ekspozicion, kiu okazis dum pluraj jaroj en Belgujo. Ĝi okazis en "Palais de Expositions" de Charleroi. La prezidanto de Belga Ligo faris propagandan prelegon antaŭ multnombra ĉeestantaro. La informpetoj pri Esperanto amasiĝis, kaj oni vendis multajn librojn i.a. 375 lernolibrojn.

Brazilo

La tagjurnalo "O Estado" informas, ke la Kultura Esperantista Kooperativo eldonis dum la lastaj jaroj pli ol 50.000 Esperanto-librojn diversspecajn.

★

"Esperanto Em Sua Casa" ("Esperanto ĉe vi") estas la titolo de la ĵus inaŭgurita Esperanto-programo, per kiu la Brazila Esperantistaro kontribuas al la Zamenhof-Jaro. Ĝi estas instrua, informa kaj socia programo dissendata per mezaj kaj mallongaj ondoj de Radio Jornal Do Brasil, sub la patroneco de Kultura Kooperativo de Esperantistoj. Pri la prezentado en la radio zorgas fakdelegito de U.E.A. en Rio de Janeiro, Jorge Soares das Neves. Aŭskultintojn ni petas sendi danksaluton al: Radio Jornal Do Brasil, "Esperanto Em Sua Casa", Av. Rio Branco 110, Rio de Janeiro.

Britujo

La 44-a Brita Esperanto Kongreso okazos en Harrogate dum la pentekosto 1960. Eksterlandanoj rajtas aliĝi al la kongreso sen pago de kotizo. Aliĝon sendu al: F-ino M. Gill, 3 Harbour Creseent, Wibsey, Bradford 6, Britujo.

Bulgarujo

La ŝtatoficistoj en Bulgarujo havas 10% pli altan salajron, se ili scias fremdajn lingvojn, inter ili ankaŭ Esperanton. La Bulgara Ĵurnalista Asocio aranĝas Esperanto-kursojn.

Okaze de la 100-jara naskiĝtago de D-ro Zamenhof la bulgara poŝto decidis eldoni poŝtmarkon honore al la aŭtoro de la Internacia Lingvo. Jam estas la 3-a poŝtmarko, kiun Bulgarujo dediĉas al Esperanto kaj al ĝia aŭtoro.

Ĉinujo

La ilustrita revuo "El Popola Ĉinio" informas, ke baldaŭ eldoniĝos en Esperanto 24 historioj laŭdinastiaj de Ĉinujo zorge de la Zhung-hua Librejo. La libro traktas la ĉinan historion de antikveco ĝis la fino de Ming-dinastio. La tuta verko dividiĝas en 80 volumoj.

Danlando

D.S.B. (la danaj ŝtatifervoj) ĵus eldonis novan eldonon de la broŝuro pri la avantaĝoj de aĉeto de semajnaŭ monatkartoj. Nun la broŝuro aperis en 20.000 ekz. en Esperanto.

★

La Ministerio por Eksterlandaj Aferoj dumtempe prilaboras sian libreton informan pri Danlando ankaŭ en Esperanto (ĝi jam aperis en 5 lingvoj). La Esperanto-eldono aperos en februaro.

Francujo

La Esperanto-grupo "Bona Stelo" de la 2 kunligitaj urboj Romans kaj Bourg de Peage sukcesis la 15-an de decembro 1959 inaŭguri Zamenhof-straton en Bourg de Peage.



La bildo montras de maldekstre: la prez. de Bona Stelo, s-ro Asqueri, la urbestroj de la du urboj kaj la ĝenerala konsilanto de Romans.

En decembro 1959 oni okaze de la Zamenhof-Jaro en la radio Marseille-Provence dissendis duonhoran programon: "La Vivo de D-ro Zamenhof" en franca lingvo.

★

En Toulouse okazos en la tagoj de la 7-a ĝis la 10-a de aprilo kongreso de G.E.E., Esperantista Instruista Asocio, membro de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Pliaj informoj estas haveblaj ĉe: "Esperantistaj Edukistoj", Muzeo Pedagogia, 3 rue Roquelaine, TOULOUSE (H.G.), Francujo.

Germanujo

Ankaŭ la urbo Nürnberg donis al strato la nomon ESPERANTO en decembro 1959.

★

En la pasinta jaro la gazetaro en Okcidenta Germanujo dediĉis al la Internacia Lingvo 1761 artikolojn kaj diversajn informojn.

★

En Elmshorn apud Hamburg s-ro Artur Pankratz faris grandan laboron por Esperanto, kaj la rezulto estis akcepto de Esperanto en la instruoplanon de la Popola Universitato de Elmshorn. Esperantistoj, kiuj sendos por la venonta ekspozicio Esperantaĵojn ricevos oficialan dankrespondon sur kolora poŝtkarto de la najbara urbo Hamburg. La adreso estas: Esperanto-klubo, 24 b Elmshorn (apud Hamburg), Panje-Strato 14, Germanujo.

Germanujo/Pollando

La pola ŝtato ĵus nun eldonis sian horaron ankaŭ en Esperanto, kaj Okcidenta Germanujo jam dum kelkaj jaroj uzas Esperanton en sia informa laboro.

Hungarujo


Al s-ro János KIRÁLY la ĉina ambasado en Budapeŝto transdonis la "Memorinsignon de la Amikeco" kun dokumento pro la amika helpo al la socia konstruado de la Ĉina Popolrespubliko. S-ro Király estis kelkfoje en Ĉinujo, kie li montris la muntadon kaj uzadon de hungaraj terkulturaj maŝinoj, kaj ĉe tiu laboro preskaŭ ĉiam esperantista interpretisto helpis lian sukcesan agadon.

★

En HUNGARA RADIO "Kossuth" oni sukcesis en la kadro "Vespera Kroniko" havi Esperanto-elsendon, kie S-ro Stefano Zambo parolis kun la esperantisto s-ro Arpad G. Pölöskey. Poste venis amaso da leteroj al la radio.

Italujo

La mondkonata Baziliko Sankta Maria Maggiore en Romo aranĝis konfesejon en Esperanto por la diverslingvaj pilgrimantoj alfluantaj al la urbo. La konfesejo estas zorgata de Pastro Giacinto Jacobitti O.P.



Britujo

En la ĉefĝardeno proksime al la ĉefplaco en Bournemouth oni malkovris benkon okaze de la Zamenhof-Tago 1959. La Urbestro, Ĉefkonsilanto s-ro L. V. Barney, J.P., faris la solenaĵon. Dediĉo estas ĉizita en la benko.

La radiodissendoj en fremdaj lingvoj de Radio-Romo, kiuj okazas sub la kontrolo de la Ĉefministra Kabineto, festis antaŭ nelonge la 1000-an dissendon en Esperanto. La programoj en la Internacia Lingvo surondiĝas trifoje ĉiusemajne kun kultura, turisma kaj informa materialo pri Italujo.

★

La itala gazeto "L'Esperanto" informas, ke dum la pasinta jaro la itala gazetaro dediĉis al la Internacia Lingvo 1176 artikolojn kaj diversajn informojn.

Jugoslavio

La Instituto de Esperanto por Slovenio informas, ke en la lernojaro 1958/59 1124 gelernantoj aliĝis al la kursoj de Esperanto, kiuj okazas en Slovenio. La kursoj estas gvidataj de 34 instruistoj kaj okazas en 34 lernejoj en 19 lokoj.

★

Okaze de la celebradoj de la Zamenhof-jaro aperas en Jugoslavio 20 diversaj verkoj en la Internacia Lingvo.

★

La urba muzeo en malgranda sed turisme grava dalmata loko Korĉula eldonis 8-paĝan ilustritan broŝuron kiel gvidilon tra la muzeo. La kroatingvan artikolon sekvas resumoj en germana kaj franca lingvoj kaj en Esperanto. La resumoj estas tre ampleksaj. La broŝuro estas havebla ĉe la aŭtoro, s-ro Narinko Ĝivoje, LJUBLJANA, Gornjsi trg 31.II, Jugoslavio, kontraŭ pago de 2 rpk.

Nederlando

Komence de decembro, survoje al Kopenhago, Prof. Lapenna prelegis ankaŭ en la nederlandaj urboj Hago kaj Arnhem. La aranĝoj estis organizitaj de la lokaj kunlaborkomitatoj de la diversaj Esperanto-unuiĝoj. En Hago okazis gazetarkonferenco, kiun ĉeestis ĉiuj grandaj hagaj ĵurnaloj. Pri ambaŭ paroladoj la lokaj gazetoj larĝe raportis.



S-ro Prof. Ivo Lapenna dum la parolado de la Zamenhof-festo en Arnhem la 8-an de decembro 1959.

Norvegujo

Laŭ "Norvega Esperantisto" la gimnazio en Sarpsborg pro iniciato de Lektoro J. H. Rosbach enkondukis Esperanton kiel fakon en la lasta klaso en la gimnazio.

Pollando

En Universitato de Nikolas Kopernik en TORUN estas kurso por gestudentoj. Al la kurso aliĝis ĉijare 42 personoj. La kursoj ekzistas jam dum 3 jaroj, kaj ilin gvidas Mag. Romuald Skaliniski.

CED

Laŭ statistiko de "Centro de Esploro kaj Dokumentado" en la pasinta jaro 20 radio-stacioj dissendis regulajn programojn en Esperanto. Tre aktivaj estis la stacioj en Romo, Zagreb, Varsovio kaj Berno.

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝo. Ge-roj H. Arends kaj M. A. Arends—Doll kun ĝojo anoncas la naskiĝon de sia filo Raymond Arthur.

NEKROLOGO

La 6-an de novembro mortis s-ro **Norman Gibson Mille** en la aĝo de 69 jaroj. Li esperantiĝis en la jaro 1909 kaj fidele laboris por Esperanto dum 50 jaroj. Li estis instruisto en elektrotekniko. La tagon antaŭ sia morto li interparolis en Esperanto kun la sekretariino de la Brisbana Klubo.

★

La 16-an de oktobro mortis subite s-ro **Panajotis Polimeropoulou**, Ateno, Grekujo, en sia 57-a jaro. Li estis estrarano de Helena Esperanto-Asocio, kaj lia filino, Heleni estas delegito de U.E.A. kaj fervora esperantistino.

★

La konata Esperanto-veterano s-ro **Hans Koch**, Munkeno, festis en decembro 1959 sian 50-jaran jubileon de Esperanto. S-ro Koch estas prez. de la direktorio de la "Germana Esperanto-Instituto" kaj estro de la ekzamenaj komisionoj.

★

La 13-an de oktobro 1959 mortis 75-jara fervora esperantisto **Paul Büemann**, Hamburgo. Por la Hamburga Esperanto-Movado lia morto estas granda perdo, ĉar li ĉiam estis fervora kaj diligenta esperantisto, kaj lia nomo Büemann estas firme ligita al la tiea movado. Ĉi tiuj linioj estu la adiaŭo al la kara "onklo Bü. de la Hamburgaj esperantistoj.

★

En Krakovo mortis la 23-an de septembro 78-jara tre malnova esperantisto, s-ro **Juliusz Kriss**. Li dediĉis al Esperanto multe da tempo ekde sia junaĝo ĝis la lasta spiro. Kaj perfekta li estis en Esperanto, ja eĉ aŭtoritato koncerne al lingvaj problemoj. Ke li estis sperta esperantisto pravas

liaj belaj versaĵoj, kaj la krakovaj esperantistoj multe funebras, ĉar kun li forpasis vere humaneca homo.

★

La Esperanto-veterano s-ro **profesor Maria Maximilian Mielert**, prez. de la Katolika Esperanto-Grupo "Pax Christi", München, subite mortis en la aĝo de 76 jaroj. S-ro Mielert ĉiam fervore laboris por Esperanto, kaj eĉ ĉijare li organizis la 4-an Internacian Katolikan Esperanto-Kongreson en München. La perdo de tiu ĉi prudenta kaj laborema viro estas ne nur por la katolika, sed ankaŭ por la komuna Esperanto-movado en München tre grava.

La plej malnova Esperantisto de la mondo.

Je la 1.2.1960 la kuracisto **D-ro Anakreon Stamatiadis** festos en Ateno (Grekujo) sian 93. naskiĝtagon. Li studadis en Parizo, de kie li venis al la malsanulejo en Bayonne. La Princ-Reganto de sia patrolando Samos vokis lin hejmen kiel direktoro de la Centra Malsanulejo en Samos kaj aparta kuracisto de la princreganta familio.


D-ro Stamatiadis esperantiĝis jam 1888, kaj en 1911 li sukcesis eldoni en Samos la unuan leĝon en la esperantista mondo pri *deviga* Esperanto instruado en ĉiuj lernejoj de la insulo. Poste li iris al Konstantinopel kaj al la insulo Kamarsn en Jemen-Arabujo, kie li eldonis la libron "Camaran" pri la moroj de la araboj. Reveninte al Istanbul li fondis la Esperanto-Asocion "Bizantio" kun samnoma ilustrita periodaĵo. La lasta sultano nomis lin oficiala reprezentanto de la turka registaro ĉe la "Supera Internacia Saneca Konsilantaro".

Post 30-jara servo d-ro Stamatiadis emeritiĝis translokiĝante al Ateno. Tie li fondis la "Superan Helenan Esperanto-Instituton", kiun li prezidas jam 33 jarojn. Ankaŭ la "Helena Esperanto-Asocio" estas li verko. Dum 44 jaroj li jam eldonas la gazeton "Helena Esperantisto", kiu nun nomiĝas "Esperanto-Ideo". Ĉiu nova greka kulturministro rekomendas je instigo de d-ro Stamatiadis cirkulere la Esperanto-instruon en la grekaj lernejoj. D-ro Stamatiadis mem instruas jam 33 jarojn senprofite Esperanton en multaj grekaj lernejoj kaj en sia hejmo al interesuloj.

En novhelenaj lingvoj li eldonis du volumojn "Esperanto-metodo" en 6-a eldono, "Nova gramatika Libro", "Grek-Esperantan Vortaron" kun "Esperanto-greka radikaro". Greklingve li publikis la dikan verkon "Delfinosimi-Genealogi-historio" kun 180 bildojn priskribante siajn 5000 antaŭulojn depost la jaro 1620.

Ni dankas al la altjaraĝa jubileulo pro li bonega laboro en la servo de nia ideo kaj deziras multan sanon kaj ĉion bonan!

D-ro Emil Feist, Bayreuth



LA JUNA VIVO

Ĉion por la redakcio de "L. J. V." sendu al :
Ivo Osibov

Tuŝkanova 21/III, Zagreb, Jugoslavio

LA 16-a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO

sub la honora protekto de
D-ro W. Drees

La 16-a Internacia Junulara Kongreso okazos de la 23-a ĝis la 30-a de Julio en Rotterdam sub la honora protekto de D-ro W. Drees, Honora Ministro kaj sub la aŭspicio de la 45-a UK, en komunuma konferenco "De Tempel".

La provizora programo antaŭvidas: interamikiĝan vesperon, solenan inaŭguron, kongresan balon kun distraĵoj, tutagan ŝipekskurson al la grandioza hidraŭlika ĉefverko, la "Delta-Projekto", plurajn ekskursojn per aŭtobuso kaj ŝipo, viziton al la internacia ekspozicio (hortikultura) Floriade en Rotterdam, kulturajn prelegojn de eminentaj esperantistoj, oratoran kaj sportajn konkursojn, laborkunsidojn kaj solenan fermon.

La kotizoj, kiuj inkluzivas ĉiujn manĝojn, la dormadon en komuna loĝejo kaj ĉiujn kongresajn aranĝojn, estas por membroj de TEJO:

malpli ol 20-jaraj
ĝis I.IV.1960 ĝis I.VII.1960
70.— ned. guld. 75.— ned. guld.
pli ol 20-jaraj
ĝis I.IV.1960 ĝis I.VII.1960
75.— ned. guld. 80.— ned. guld.
Nemembroj de TEJO devas pagi 4.— ned. guld. pli.

La monon kaj la aliĝilon oni sendu samtempe al la landaj perantoj:

Britujo:

Humphrey Tonkin, 7, Granny's Lane, PERRANPORTH, Cornwall

Danlando:

Hans H. Frey, Hjørringvej 51, FREDERIKSHAVN, poŝtĉekkonto 80419

Francujo:

J. P. Colnot, 16 Av. Déroulède, LAXOU (M&M), poŝtĉekkonto 1272-21 Nancy

Germanujo:

Germana Esperanto-Junularo, T 6/18, MANNHEIM, poŝtĉekkonto Karlsruhe 54577 (Deutsche Esperanto-Jugend, Mannheim)

Italujo:

Nicola Minnaja, Viale Giulio Cesare 223, ROMA

Svisujo:

Esperanto-Junularo de Svislando, Nordstrasse 216, ZURICH 37, poŝtĉekkonto n-ro IV 6291
aŭ rekte al la 16-a IJK de TEJO, Een-

drachtsweg 7, ROTTERDAM, Nederlando, poŝtĉekkonto 275461.

Ne prokrastu, aliĝu tuj! Atendas vin la malnovaj kaj novaj amikoj, unusemajna ĝuo, restado inter samaĝuloj el diversaj landoj, amuzo, distro kaj laboro.

GUATEMALA ESPERANTISTA JUNULARO

Post multaj miaj klopodoj, kiel: artikoloj en ĵurnaloj, informoj dum miaj radio-elsendoj, konsiloj al miaj lernantoj en du privataj gimnazioj, mi sukcesis kunveni aron da gejunuloj por formi novan grupon, kiel sekcion de Guatemala Esperantista Asocio.

Lic. Edmundo Quiñones, vicprezidanto, kaj mi, kiel membroj de la Estraro de GEA parolis dum la kunveno kun la ĉeestantoj pri la urĝa neceso starigi en la lando, precipe en la ĉefurbo, grupon de esperantistaj gejunuloj. Tuj 40 gejunuloj enskribiĝis, inter ili gelernantoj de la liberaj Esperanto-kursoj de s-ino Consuelo de Sanchez-Latour, de lic. Edmundo Quiñones, de Prof. Raúl Ramirez; plie, de miaj lernantoj de Esperanto-kursoj, liberaj kaj devigaj en gimnazioj kaj kelkaj de la Radio Nacional.

La unua decido estis organizi rapidan kurson de la Internacia Lingvo, celante interkorespondi kiel eble plej baldaŭ kun samideanoj en la tuta mondo. La kunvenintoj elektis min kiel gvidanton de tiu rapida kurso, kies lecionoj okazas kvinfoje semajne en la Popola Universitato.

La Komitato de GEJ estas formita de: prezidantino, Telma Melgar; vicprezidanto: Baldomero Antonio Chavez; sekretario: Gustavo Alfonso Cruz; kasisto: Carlos Aguirre Valdez; voĉdonantoj: Blanca Lidia Morán, Abel Navas kaj Leonardo Castellanos.

Informojn pri la esperantista junulara movado ricevas la prezidantino, Telma Melgar, 22 calle, n-ro 36-71, zona 5, Guatemala-Ciudad.

D-ro Jules Bonge

AKTIVADO INTER LA JUNULARO EN PAZARGIK

Jam tre ofte ni ĉiuj parolas kaj konsentas, ke la estonto de nia afero ankaŭ estas la junularo kaj precipe la gelernantoj kaj la studentoj. Konsiderante tiun fakton la Esperanto-societo "Radio" en Pazargik (Bulgarujo) dediĉis sian atenton ĉefe al la lerneja junularo. Tiel nun en Pazargik funk-

cias 2 Esperanto-kursoj kaj 8 Esperanto-klasoj.

En la 7-a klaso de la lernejo "G. Dimitrov" instruas Esperanton al 17 gelernantoj la instruistino pri la rusa lingvo N. I. Koseva. En la 4-a gimnazio funkcias kurso kun 18 gelernantoj sub la gvido de s-ano N. I. Angelov, S-ano N. I. Ĉarcarov gvidas Esperanto-kurson de 17 lernantoj en la 2-a gimnazio "K. Veliĉkov". En alia klaso de la sama gimnazio instruas s-ano P. Arnaŭdov, kiu gvidas ankaŭ kurson por progresintoj. Ankaŭ la lernantinoj D. Pavlova kaj P. Vasi-leva gvidas du kursojn. En la 3-a gimnazio gvidas kurson tri lernantinoj helpe de s-ano Arnaudov. La intereso estas granda kaj la societo bone ĝin eluzas samtempe kreante novajn junajn kursgvidantojn.

La raporto de Petko Arnaudov

INTERŜANĜO DE KULTURAJ GRUPOJ

Dum la festotagoj okaze de la Tago de Respubliko, la 29-an kaj la 30-an de Novembro la beogradaj junaj esperantistoj gastigis junularan grupon el Ljubljana (Jugoslavio). La grupo, kiu konsistis el 50 gejunuloj, prezentis al la esperantista publiko en Beograd kulturan programon. La tuta aranĝo estas organizita kiel reciproka interŝanĝo de kulturaj grupoj inter Beograd kaj Ljubljana. Dum la vintraj ferioj, en Januaro, venos la junaj beogradanoj al Ljubljana kun sia kultura programo en Esperanto. T. Rogelj

5-a Internacia Junularkunveno sur Feldberg

14. — 18. 4. 1960

Daŭrigante niajn tradiciajn Paskajn Feldberg-renkontiĝojn ni kore invitas la junajn geesperantistojn en- kaj eksterlandajn, travivi siajn paskajn feriojn en internacia rondo en kaj ekster la komforta junulargastejo (iama hotelo) Hebelhof apud la 1500 m alta Feldberg proksime al Titisee, Germanujo. Kiel la plej alta punkto kaj kvazaŭ la koro de la Nigra Arbaro, la Feldberg-regiono estas sporta kaj migrada paradizo.

Same kiel la pasintjaraj, la ĉi-jara renkontiĝo celas praktikan internacian kompreniĝon inter gejunuloj pere de Esperanto, perfektigon en Esperanto per prelegoj, diskutoj kaj abunda konversacio kaj nelaste refreŝiĝon dum ekskursoj per aŭ sen skioj.

La prezo (enhavanta loĝadon, hejtadon kaj ĉiujn manĝojn) estas 20 GM por gepartoprenantoj malpli ol 20-jaraj kaj 25 GM por pli ol 20-jaraj.

Bonvolu baldaŭ anonci vian partoprenon al la Germana Esperanto-Junularo, T 6/18, Mannheim, Germanujo, kun indikoj pri viaj nomo, antaŭnomo, preciza adreso, naskiĝdato kaj profesio. Limdato por aliĝoj estas la 31-a de marto 1960.

Koran bonvenon sur Feldberg!

Germana Esperanto-Junularo
Federacia Estraro

Forpasis Profesoro Hugo Sirk

Ĝuste je la Zamenhof-Tago 1959 trafis la Movadon forta bato: tiun tagon mortis tute neatendite, D-ro Hugo Sirk, emerita profesoro pri fiziko en la Universitato de Vieno, lektoro pri Esperanto en la Teknika Universitato en Vieno, en la aĝo de 79 jaroj.

Prof. Sirk estis unu el la plej fidelaj, sindonaj kaj integraj membroj de la Asocio kaj lia signifo por la Movado entute estas netakseble granda.

Kiel konata fakulo pri fiziko li verkis multajn sciencajn artikolojn en la Internacia Lingvo kaj levis la prestiĝon de Esperanto en fakaj medioj. Li grave kontribuis al la scienca literaturo en Esperanto.

En ĉiuj laborperiodoj de la Internacia Somera Universitato, ekde ĝia reorganizo en 1948, li faris altnivelan prelegon pri iu aktuala temo de sia fako. Nur el la lastaj jaroj ni citu:

"Ĉu ni povas vidi la atomojn";

"La uzo de radiokarbono por la determino de la aĝo de organikaj";

"Ĉu ekzistas atomoj de energio?";

"La centjara jubileo de la spektralanalizo en 1959";


prelegoj, kiuj ĉiuj por si montris grandan fakan scion kaj lertan kapablon transdoni ĝin al nefaka aŭskultantaro. Li kreis al si propran publikon inter la kongresanoj. Malfacile estos alkutimiĝi al la malĉeesto de Prof. Sirk en la Kongresoj, kie lia simpatia kaj modesta personeco estis konata al ĉiuj.

U.E.A. ĉiam rememoros lin kun granda respekto kaj dankemo. Li ripozu en paco.

IDILIO

EN

BRUSELO



Strato en la kongresurbo de 1960.

LA VOĈO DE AMERIKO DISSENDOS RADIO-PROGRAMOJN EN ESPERANTO

La Voĉo de Ameriko, la tutmonda radio-servo de la usona registaro, decidis dissendi eksperimentan serion da programoj en Esperanto, komencante la 11-an de Marto 1960. Oni preparas 6 programojn 30-minutajn kun tre varia enhavo: intervjuoj, diskuttrondoj, raportoj pri kulturo, literaturo, ekonomio, scienco, tekniko kaj la eksterlanda politiko de Usono, novaĵoj el la Esperanto-movado, "Demandoj kaj Respondoj pri Ameriko". La programojn direktas D-ro William Solzbacher.

En ĉiuj sinsekvaj semajnoj ĉiu programo estos dissendita trifoje ĉiun vendredon, je 11.00, 12.00 kaj 22.00 h. laŭ la horsistemo de Greenwich. La unua sendo, sur la ondlongo de 41.90 metroj (7160 kilocikloj), devus esti bone aŭdebla en Orienta Azio (je la 8-a vespere en Japanujo, la 7-a en Ĉinujo, la 7-a kaj duono en Koreo). La dua sendo, sur la ondlongo de 19.72 m (15210 kcs), devus esti bone aŭdebla en Sudorienta Azio (je la 7-a kaj duono vespere en Indonezio, la Malaja Federacio kaj Singaporo, la 8-a en la Filipinaj Insuloj kaj Ĉinujo, la 5-a kaj duono en Hindujo). La tria sendo, sur la ondlongoj de 31.28 m (9590 kcs) kaj 30.74 m (9760 kcs), devus esti bone aŭdebla en Eŭropo kaj la apudaj regionoj de Azio kaj Afriko (je la 10-a vespere en Britujo, Portugalujo kaj Maroko, la 11-a en la plimulto de eŭropaj landoj, je meznokto en Grekujo, Turkujo, Bulgarujo, Egiptujo ktp.). La programoj estos aŭdeblaj ankaŭ en aliaj partoj de la mondo.

La Voĉo de Ameriko decidis laŭ la spertoj kaj rezultoj de la eksperimenta serio pri eventuala regula uzo de Esperanto. Raportoj pri la ricevo de la programoj, rimarkoj pri la enhavo kaj demandoj respondotaj en la rubriko "Demandoj kaj Respondoj pri Ameriko" estu adresitaj al D-ro W. Solzbacher, Voice of America, Rm. 2528 HEW, Washington 25, D.C., Usono.

La delegito de UEA en Uetersen (Germanujo) dankas kore nian delegitinton en Dunkerque (Francujo) s-inon L. M. Vanhersecke kaj la delegiton en Bourbourg (Francujo) s-on J. Doyelle pro granda helpo je la organizo kaj efektivigo de du junularaj karavanoj al la tomboj de germanaj militmortintoj en la regiono de Dunkerque. Plenumante la taskon flegi la tombojn de la militviktimoj la junuloj ekkonis tre bone la sencecon de militoj kaj la necescon de paca kunlaborado kun la najbaraj popoloj. Simbola estis sceno en Bourbourg, kiam la junulargrupo metis flargarbon ĉe la monumento je honoro de la mortintaj francaj soldatoj. Mi parolis la honorajn vortojn esperantlingve pri la deziro de la germana junularo konstrui kun la franca junularo novan pacan mondon. Sinjoro Doyelle tradukis mian paroladon al la urbestro kaj al la ĉeestantaj magistratanoj pruvante, ke Esperanto estas lingvo tre taŭga transigi pensojn kaj sentojn de homo al homo.

R. Pfütze, del. de UEA.

Radio - Babiloj

(27) "La geesperantistoj havas la dissendojn, kiujn ili meritas!"

Vivi sen kaj kun Esperanto-radio-programeroj.

Kvar monatojn (de 16/VI — 15/XI/1959) mi kuŝadis en malsanulejo. Tio signifis por mi kvar monatojn sen Esperanto-radio-dissendoj! En la malsanulejo, kie mi kuŝis, estis ĉe ĉiu lito kaŭĉuka kuseneto enhavanta radio-kaptelefonon, kiu aŭdigas la radioprogramojn distribuatajn tra kvar linioj: n-roj 1 kaj 2 transdonis la programojn de Hilversumo I kaj II kaj n-roj 3 kaj 4 alterne donis la programojn de regiona kaj najbarlandaj stacioj. En la horoj, kiam mi povis aŭskulti, neniam okazis Esperanto-dissendoj. Povante aŭskulti radion, mi tamen ne povis aŭdi Esperanton per ĝi. La manko konsciigis la bezonon: en la momentoj, kiam mi sciis, ke la konataj voĉoj de la geparolistoj kaj geprelegistoj de la radio-stacioj Berno, Romo, Varsovio, Zagrebo kaj aliaj sonas tra la etero, mi ne povis aŭdi ilin. Mankis io al mi: mi ne povis senti min ano de la mondvasta "granda rondo familia", pri kiu d-ro Zamenhof kantigas nin en la himno.

Nun denove kuŝante hejme apud bona radioricevilo, mi kun tre granda ĝojo renovigis la kontakton tra-eteran kun niaj en- kaj eksterlandaj gesamideanoj kaj plene konscias pri la valoro de Esperanto-radio-dissendoj por gesamideanoj dise loĝantaj tra la tuta mondo. La Esperanto-dissendoj estas tre multvaloraj speciale por gesamideanoj, kiuj loĝas en izolitaj lokoj kaj tial ne povas ĉeesti Esperanto-kunvenojn, kaj por genovuloj, kiuj sekvas skriban aŭ gazetan kurson kaj do povas aŭdi Esperanton kaj kontroli sian elparolmanieron nur per radio.

Tial ni kune zorgu, ke ni havu "la dissendojn, kiujn ni meritas", aŭskultante regule la radioprogramojn en Esperanto kaj sciigante niajn dankon, dezirojn kaj sugestojn al la stacioj.

Esperanto-dissendoj de Radio-Hilversumo (Nederlando).

Dum pluraj jaroj 3 radiodisaŭdigaj asocioj en Nederlando per la stacioj Hilversumo I kaj II dissendis informojn kaj prelegojn en Esperanto, kiujn aŭskultas regule aŭ de tempo al tempo ankaŭ ali-opiniantaj geesperantistoj en pluraj landoj.

La V.A.R.A., kiu antaŭe dissendis socialistajn informojn en Esperanto **merkrede** de 23.50 ĝis 24.00 (M.E.T.), ek de oktobro 1959-a dissendas ilin **vendrede** de 23.00 ĝis 23.10 kaj ŝatus scii, ĉu la novaj tago kaj horo (pli aŭ malpli) bone konvenas al la geaŭskultantoj. Leterojn aŭ kartojn oni sendu al V.A.R.A., poŝtkesto 175, Hilversum (Nederlando). Montru vian interesiĝon kaj sciigu viajn dezirojn kaj sugestojn. Eble tiu asocio repliinteresiĝos pri Esperanto kaj reenkondukos Esperanto-radiokurson.

La nederlanda rom-katolika radiodisaŭdiga asocio K.R.O. tre strange en la Zamenhofjubilea jaro decidis ĉesigi siajn sabatajn rom-katolikajn informojn en Esperanto, kiujn aŭskultis por ekzerco ankaŭ multaj ne-r.k. geaŭskultantoj. Tiuj, kiuj bedaŭras tiun ĉesigon, esprimu sian deziron pri renovigo de tiu Esperanto-programero al la K.R.O., Hilversum (Nederlando).

La regula Esperanto-prelego kun muzika enkadrigo de N.C.R.V. en la unua lundo de ĉiu monato de 23.40 ĝis 23.55 (M.E.T.) daŭros plu.

Radio Luksemburga dissendis Esperanton.

Nia samideano K. Ruig, Amsterdamo, sciigis, ke la 27-an de junio 1959-a, kiam mi mem ne povis aŭskulti per propra ricevilo, la radio-stacio Luksemburgo disaŭdigis Esperanton en intervjuo pri libertemp-lokoj en Pollando kaj la Universala Kongreso en Varsovio. Post tio sekvis reklam-anonco de gramofondisk-firmo pri ĝia kompleta

surdiska Esperanto-kurso. (Radio Luksemburgo ja estas komerca stacio, kiu dissendas per la ondoj 208 m kaj 49 m tre variajn programojn... (kun reklamo).

Kiuj aŭdis tiun dissendon en Esperanto, nepre esprimu sian deziron al Radio Luksemburga, ke tiu unua dissendo en Esperanto ne estu la lasta.

"Parolas Varsovio, la naskiĝurbo de Esperanto!"

En la Zamenhofjubilea jaro certe tre multe da geaŭskultantoj aŭdis ĉi-supran anoncon de la Pola Radio je la 16.30-a (M.E.T.).

Tiu voko enkondukis ĉiam tre interesan kaj varian programon, ne nur antaŭ la kongreso, sed ankaŭ poste. Ni esperas, ke la Pola Radio ankoraŭ tre longe daŭrigos tiun **ĉiutagan** Esperanto-programon de 16.30 ĝis 17.00 (M.E.T.) per ok (!) ondoj, el kiuj vi certe povas klare kapti almenaŭ unu. En Nederlando tiu de 31,50 m estas tre forte kaj klare aŭdebla.

La Pola Radio dissendas Esperanto-programojn laŭ jena skemo: **Dimanĉe**: La panoramo de internaciaj eventoj kaj Esperantista Magazino "Sub la Verda Stelo." **Lunde**: Felietono pri politika, socia, ekonomia aŭ kultura temo.

Marde: Vortmuzika elsendo prezentanta polajn muzikon kaj muzikistojn. **Merkrede**: Kultura kroniko kaj koncerto kun bondeziroj. **Jaŭde**: Komentario de Observanto pri aktualaj temoj kaj leterkesto. **Vendrede**: Literatura rubriko. **Sabate**: Sonrevuo "La semajno en Pollando."

Leteroj de geaŭskultantoj kun sugestoj, deziroj kaj kritiko al Pola Radio, Esperanto-disaŭdigoj, Varsovio (Pollando), estas ĉiam bonvenaj. La plej bona letero de monato estas rekompencata per Esperanto-libro. Pola Radio surprizis la sukskribinton per la bela libro "Quo Vadis" de Henryk Sienkiewicz en la Esperanto-traduko de Lidja Zamenhof kiel 2-a premio pri la monato julio 1959-a. Kiu(j) sekvos ???

13/XI/1959.

S. S. de JONG Dzn,
estro Radio-Servo N.C.K.E.,
TJERKEWERD (Frislando), NEDERLANDO

INFANDESEGNAĴOJ

En Nederlando ekzistas organizaĵo kun la nomo "Desegnado estas mondlingvo". Ĝi estas sekcio de la mondorganizaĵo "Art for Worldfriendship" — "Arto por Mondamikeco" — kiu ekde 1947 elŝanĝas internacie infandeseĝnaĵojn. Antaŭ nelonge la sekretariino de la Nederlanda sekcio sciigis, ke ŝi ricevis jam multe da desegnaĵoj el eksterlando, kaj ŝi petis geamikojn por la sendintaj knaboj kaj knabinoj. Oni povis tiel elŝanĝi desegnaĵojn kaj eventuale samtempe ankaŭ korespondi, ĉu mem, ĉu helpe de gepatroj. Mi petis korespondanton por mia filineto, petante korespondon en Esperanto, sed ricevis desegnaĵon de Usona knabino, kiu nur povis korespondi en angla lingvo.

La sekretariino sciigis, ke ŝi ne havis momente gekorespondantojn en Esperanto.

Pro tio mi nun apelacias al ĉiuj Esperantistaj gepatroj kaj geïnstruistoj: bonvolu instigi la infanojn al desegnado kaj sendu la rezultojn al sekretariino de "Desegnado estas mondlingvo", S-no C. Ozinga, Jacob van Ruysdaelstraat 24 bis, Utrecht, Nederlando. Petu krome korespondadon en Esperanto. Saman alvokon vi povas jam trovi en la amuza Esperantlingva eldono "Sankta Nikolao en Nederlando", sur paĝo 22.

Helpu grandnombre, por ke ni tiel rompu la barojn de nia propra izoleco kaj pruvu al aliaj la taŭgecon de Esperanto.

Arnhem (Nederlando), H. Groendijk

Belartaj Konkursoj 1959

Branĉo : Originala Prozo

Dua Premio

LA ATENDEJO

Numero Unu energie malfermis la pordon kaj enpaŝis la oficejon. Tuj li sentis embarason. Anstataŭ la brua publika demando kiun li atendis, li sin trovis en kvazaŭ intima sekretariejo. Mola tapiŝo kovris la plankon, bildoj pendis sur la muroj, benko, komforte remburita, sin etendis laŭ unu flanko kontraŭ li, en angulo, staris skribotablo kun seĝo oportune lokita antaŭ ĝi. En la mezo de la ĉambro fraŭlino sidis ĉe ia skribaparato kaj kvankam ŝi ne atentis lin, li sentis, ke ŝi per unu penetrema rigardo estis tute travidinta lin. Li tuse-tis. Ŝi ne levis la okulojn. Post paŭzeto, li riskis, "Mi petas pardonon, fraŭlino, se mi trudas min en privatan oficejon, sed oni direktis min ĉi tien; mi serĉas postenon responde al reklamo de via firmo kaj via ĉefo sciigis, ke mi venu kiam taŭgos por mi. Se mi trafis en malĝustan lokon, bonvole senkul-pigu min."

"Vi ĝuste trafis", respondis la fraŭlino. "Vi ne havas, kompreneble, difinitan rendevuohoron kun la Mastro, sed vi rajtas atendi ĉi tie. Prenu sidlokon aŭ pasigu la tempon laŭplaĉe". "Multan dankon!" li respondis tiel senŝargite, ke ŝi iom ridetis. "Ŝi estas almenaŭ ridetkapabla", li pensis, "Tiel imponan sekretariinon mi neniam antaŭe vidis; belega ŝi estas kiel klasika statuo; iom majesta, por nur esti tajpistino. "Ne juĝu pri afero laŭ ĝia ekstero" kompreneble. Nun kiam mi havas okazon mi plene ekzameni ĉi tiun luksan ĉambron, ĉar mi estos eble alvokita tute baldaŭ. Supozeble tiu pordo en la kontraŭa muro kun la vorto "MASTRO" kondukas al la privata oficejo de la ĉef-administranto. Li titolas sin iom malnovmode sed tio tute kongruas kun ĉi tiu vasta bone meblita ĉambro; entute ne malbona aŭguro por la oficistoj, inter ili eble mi, kiu laborados ĉi tie, kvankam la informo pri la preciza ofico estis iom nebuleca al mi. Eble mi ekhavos kuraĝon demandi tiun fraŭlinon pri kondiĉoj kaj tiel plu. Mia edzino nepre postulos ĝisfundan priskribon de ĉio, tamen mi ne tro laŭdu la belecon de tiu supereca tajpistino! Ha, nun mi memoras kiun ŝi similas — la ĉefviolonistinon ĉe la hieraŭa koncerto; kiel verve kaj vigle tiu ludis; ĉiu movo, ĉiu muskolo estis sub potenca kontrolo, same kiel tiu nun tajpas".

Liajn pensojn interrompis la alveno de Numero Du, kiu, frapinte ĉe la pordo, sed ne atendinta

respondon, senĝene enpaŝis kaj sin direktis al la tablo kaj diris, ke li venis responde al anonco pri posteno. "Ĉu eblas intervui la dunganton nun? Ne? Kiom longe do, mi devos atendi?" Ŝi klarigis oficialavoĉe, ke la Mastro neniam cedas difinit-horan rendevuon; li estas ĉiam okupata kaj devas teni sin preta pritrakti neatenditajn okazaĵojn. Tamen, li nepre alvokos ĝustatempe, ĉiun kiu havas aferon kun li; necesas nur iom da pacienco kelkfoje. Videble nekontenta, Du prenis lokon apud Unu kaj nur nun vidante lin malzorge salutis, "Ĉu ankaŭ vi atendas? Espereble, tio ne daŭros longe; mi scias amuzi min multe pli trafe ol atendadi ĉi tie".

"Verdire, tamen, ĉi tiu atendejo estas aparte luksa; ni povus esti respektataj klientoj anstataŭ oficoserĉantoj, laŭ la komforto kiun oni provizas. Ĉi tiu benko ekzemple havas faldeblajn brakapogilojn kun cindrujoj por fumantoj, ĝuste kiel ĉe unuaklasaj fervojkupeoj; se ni devos eĉ longe atendi ni ne povos juste plendi". "Eble vi pravas", respondis Du per voĉtono kiu kontraŭdiris la frazosencon. "Vi estas facile kontentigebla naivulo", li pensis, "kaj ĝuste tiaj malhelpas al aliaj postuli pli da bonaĵoj en la vivo. Nu, tiu tajpistino aspektas interesa. Ŝi povus montri pli de tiuj kruroj por ni. Laŭkataloga inaĵo efektive. Se mi akceptos postenon ĉi tie, mi certe klopodos aranĝi rendevuojn kun ŝi por iom gustumi. Ŝi ŝajnas iom rigida sidanta tie, sed post unu-du trinkoj ĉe "La Gaja Luno" kun mi, mi igus ŝin pli fleksebla..... Rrrr, kian rigardon ŝi ĵetas! Ĉu ŝi aŭdis mian penson? Kia glaciiga kolono. Jes, ĉesu bori min per tiuj serpentaĵoj kaj daŭrigu vian skribadon. Ta! tiajn inojn oni devas loki en muzeojn, ne inter ruĝsanguloj. Nu, cigaredon".

Denove la pordo cedis por enlasi Numeron Tri. Li bonhumore salutis ĉiujn ĝenerale kaj eksidis apud Du. "Ĉu ankaŭ vi estas kandidato por posteno ĉi tie?" tuj demandis Du. "Ho, mi supozas, ke jes. Ŝajnas, ke oni volas, ke mi prezentu min ĉi tie. Al mi estas egale ĉu ekstere ĉu interne. "Universitatan diplomon?" "Nenian diplomon mi havis, sed universalan aplombon", elridis Tri, "Sed la mondo estas sufiĉe granda por enteni ĉiujn el ni. Ĉu vi jam longe atendis? Jes? Ho tio ne ĝenos min. Mi povus eĉ dormi ie ajn aŭ iam ajn; akiris la kutimon en la mararmeo. Cetere mi kunportis dikan gazeton kaj mi vidas krome libron tie". Du rigardis en la montritan direkton. "Tiel estas. Strange, ke mi ne vidis tion antaŭe". "Ankaŭ mi nur nun konscie vidas tion", ekkontribuis Unu, "Sed mi trovas la tutan ĉambron iom aliaspekta ol mi unue supozis. Certe pli granda. Sento de moviĝado aŭ pli ĝuste, vibrado en la aero". "Nenio mistera pri tio", diris Du sarkasme, "Akre trablovas de sub la pordo. Mi sentis ĝin jam plurajn minutojn kaj metis la piedojn sur tabureton kiun mi trovis sub la benko. La loko ne estas tiel komforta kiel vi pensis, ĉu?" "Vi

pravas pri la trablovo sed ĝi estas stimula pli ol malkomfortiga. Tiu tajpistino, aŭ kio ŝi estas, devas senti ĝin pli forte ĉar ŝi sidadas rekte kontraŭ la pordo, meze de la trafluo. He! Tri, ĉu vi kompleze donos parton de tiu dika gazeto?" Kaj preninte kaj faldinte ĝin taŭgaforme, li ŝtopis la spacon inter la pordo-malsupro kaj la planko. "Ĉu permesate? En ordo?" "li signis per la okuloj al la sekretariino. "Jes, kompreneble", ŝi respondis laŭte, ne alrigardante sed daŭrigante sian senhaltan skribadon.

"Estas skandale, ke oni atendigas nin tiel", ekgrumblis Du post longa paŭzo, "Se mi ne volus perdi la vicon, mi rezignus pri ĉi tiu postenaĉo kaj tuj reirus hejmen. Mi ordinare tute precize encerbigas gravajn detalojn sed iel mi ne nun klare memoras la cirkonstancojn de mia decido provi postenon ĉi tie; en kiu ĵurnalo aŭ simile vi vidis la anoncon?" "Nu", konfesis Unu, "Ankaŭ mi estas iom mistifikita pri tio, sed mi nepre ne forlasos ĉi tiun ĉambron ĝis mi estos vidinta la rilatan sinjoron, sed pardonu, mi deziras pli detale rigardi tiun pentraĵon ĉe la kontraŭa muro....." kaj li ekstaris. "Tiu ĉi estas nur scivolema bubo", diris Unu en si. "Kion li volas nun? Li aspektas kiel infano trovinta perditajn".

Unu gestis al ili de la alia flanko. Tri tro enprofundiĝis en sian legaĵon por atendi. Du, ekle-vante la ŝultrojn kaj, la manoj en la poŝoj, drivis transen. "Venu ĉi tien!" kriis Unu ekscitite, "Rigardu, ĉi tiu ĉambro estas multege pli granda ol ni supozis. Ni sidas en nura niĉeto!" Estis vere; ambaŭflanke etendiĝis larĝa koridoro kaj la plafono, tute ne malalta super ilia sidloko, situis ĉi tre mirinde alta kaj ŝajnis riĉe dekoraciita, per stela desegno, kvankam pro la lumaranĝo, ĝi estis nur vuale videbla. "Ni povus esti en katedralo!" "Ho", kontraŭis Du, "Estas grandparte trompa tekniko, kiu tiel efikas, ke la perspektivo pli longiĝas. Mi forgesas la detalojn de la afero sed mi iam legis pri tio". "Ni voku Tri; lin ne povas ne interesi ĉio ĉi tio". "Lasu lin, li estas videble tute feliĉa kun sia gazeto". "Ni do, esploru iom en la por ni novaj partoj de ĉi tiu ĉambraro; supozeble ni rajtas tion fari". "Ni per tio povus perdi la vicon; cetere la aliaj partoj, kiom mi vidas, ne tre diferencas de nia nuna loko.

"Neniu perdas vicon ĉe ni kaj vi rajtas iradi ĉien en la atendejo; proprariske komprenebla". Estis la tajpistino, kiu parolis, sed ŝi eĉ ne levis la kapon parolante, sed daŭre atentis sian ŝajne senfinan laboron. "Tiu porcelana figuro havas akrajn orelojn", sarkasmis Du flustre, daŭrigante laŭte, "Mi ne vidas kialon vagi ĉirkaŭe; oni povas enui egale en alia parto de la sama atendejo — tia ĉi senfina atendigo estas ne malpli ol skandalo. Iru do, eble mi sekvos poste se mia humoro ŝanĝiĝos. He! Tri, Ĉu ni iom kartludu por eviti morti de enuo?" "Enuo?" miris Tri, "Mi ĝuas la tempon ĉi tie". "Ĝuas, vi diras? Sed vi jam de longe ĉesis legi;

kiel vi povas ne enui, enuegi?" "Mi estas feliĉa pensante. Ordinare mi ne havas tempon aŭ trankvilon por pensi; aŭ mi laboras, aŭ oni babilas al mi, aŭ la radio blekas aŭ oni devas dormi aŭ legi. Sed nuntempe, nenio ĝenas, neniu postulas de mi, do mi havas la eksterordinaran plezuron pensi". "Aŭ vi blagas, Tri, aŭ vi estas stranga ulo. Tiuokaze vi ja kongruas kun ĉi tiu stranga ejo. Mi komencas dubi ĉu mi vivas en realo". "Ĉu strange, ke homo pensas? Pro kio do, la cerbo?" "Amiko mia, mi havas dentojn sed tamen ne ĉiam maĉadas, sed nur kiam mi havas bezonon maĉi; same krurojn kiu ne ĉiam bezonas kuri. Se mi bezonus pensi, se ekzemple iu volus negoci kun mi, aŭ intervjui min aŭ ludi kartojn, tiuokaze mi ja pensus; neniu pli vigle, mi certigas al vi. Sed ne havante kaŭzon uzi la cerbmotoron, mi permesas al ĝi ripozi; vi ne lasus aŭto-motoron vake funkcii tra la tuta tempo, ekzemple dum la tuta tempaĉo de nia atendado ĉi tie."

"Ĉu infano, aŭ ŝafido, utiligas siajn krurojn nur kiam ĝi nepre devas? Ne, ĝi funkciigas ilin pro la nura plezuro. Same homo funkciigas la cerbon, ne nur por kalkuli monon aŭ negoci. Dum mi sidis ĉi tie mi reĝuadis tutan teatraĵon, eble ne ĉiun vorton, sed ankaŭ ne nur la vortojn sed la movojn kaj gestojn de la aktoroj kaj eĉ tio ne finis la plezuron riceveblan. Mi haltigis la ludadon kiam ajn mi volis por kritiki, analizi, kontrasti kaj kompari — kion mi ne povis fari ĉe la teatraĵoludo mem".

"Mi nomus vin filozofo, ĉu? La arto mensogkonvinki sin ke malagrable estas agrable aŭ vakuo estas pleno kaj tiel plu". "Ne temas pri tio. Mi ne pretendas originalan pensadon; tio estas por la ege malmultaj. Mi konfesas, ke mi ne malofte trovas plezuron rememorante matematikajn formulojn de miaj lernejoj tagoj. Ekzemple mi povus, se mi pripensus sufiĉe longe, repruvi la teoremon de Pitagoro, aŭ la formulon determini aritmetikan progresion".

"Mi jam rimarkis, tamen sen envio, ke la bovoj neniam oscedas; ŝajnas al mi, ke mi trovis specon de homa bovo. Per tekniko de mensa remaĉado vi sukcesas persvadi vin, ke vi sidas ĉe festeno. Nu, bonan apetiton ĉe la brokantaj frandaĵoj. Mi obstinos resti ĉe mia deziro por la objektivaj plezuroj". "Sed", replikis Tri "ĉiaj plezuroj estas fine sensacioj en la cerbo; elektraj impulsoj, sciencistoj diras; do ĉu estas efektiva diferenco inter la subjektivaj kaj la objektivaj plezuroj?" "Tiaj subtilaĵoj ne aliigas la faktojn. Metu la manon en fajron kaj provu forrezoni la doloron; ja ankaŭ la doloro estas fine nur elektraj impulsoj. Ni povas renomi niajn sentojn sed tio ne aliigas ilin kaj mensa doloro inkluzive la enuon estas tute realaj. Eble vi opinias, ke vi portas paradizon en la poŝo. Mi estas pli realisma. Se mi sentas mensan ĝenon mi volas ŝanĝi la kondiĉon kiu kreas ĝin same kiel

se estas fizika ĝeno, ekzemple malvarman trablo-
von, ni klopodas forigi ĝin".

"Nu", diris Tri, "Vi atribuas al mi pli ol mi ja
antaŭmetis. Vi akuzis min nur imagi min feliĉa
kiam mi perpanse distras min. Sed ĉu mi per tio
ne efektive ŝanĝis la kondiĉojn? Ni mem estas
parto de la sistemo en kiu ni troviĝas. Se la tem-
peraturo de nia medio malaltiĝas kaj neblas levi
ĝin per ia hejto, ni klopodas surmeti pli da dikaj
vestoj. Simile, se materialaj ĝojstimuloj mankas,
ni povas per aldono de pluaj mensovestoj reakiri
feliĉon. Sed mia vera ideo estas, ke ĉiu homo havas
stokon de antaŭaj spertoj aŭ ĝuoj kiujn li povas
mense aperigi antaŭ si denove".

"Do, Tri, vi konsilus al malsatanto remanĝi la
pasintsemajnan porcion, ĉu? Sed kio pri la pro-
verbo, manĝis en merkredo, ne serĉu en vendredo?"
La kinematografoamantoj povus ŝpari monon se
via teorio havus sencon".

"Estas facile kontraŭciti proverbojn; ekzemple,
"por unu festeno, por alia veneno", sed mi rakontu
al vi pri onklino de mia patrino. Tiu, en frua aĝo
transvivis akcidenton kiu rabis ĉe ŝi la irpovon. Ŝi
devis resti ĉiam enlite. Unue ŝi estis senkonsola
kaj fariĝis peza ŝarĝo por siaj gepatroj ĝis unu
tagon iu donis al ŝi libron de poemoj. Ŝi ne plene
komprenis la verkon kaj havigis al si pluajn
librojn por lerni pri diversaj scioj. Baldaŭ ŝi fariĝis
tiel okupata, ke ŝi havis eĉ ne minuton sena je ago
kaj intereso. Ŝi akiris vastan scion kaj saĝecon,
povis helpi al multaj laŭ diversaj manieroj; ŝi eĉ
verkis librojn kaj kompreneble estiĝis legendo en
nia familio. Mia patrino ofte admonis nin se ni
volis plendi pri manko de amuziloj, "Vi havas tutan
mondon explorendan en la propra kranio."

"Eĉ en Edeno Adamo ne povis esti feliĉa sola. Mi
ne estas litligita revemulino sed ruĝsanga viro. Tiu
aĉa Mastro serĉu iun alian por sia vaka ofico; mi
intencas reiri al tie de kie mi venis!"

"De kie vi venis, Numero Du?" La demando
venis de la tajpistino. Kvankam la simpla frazo
estis senemocie esprimita ĝi forte efikis. "Mi, mi
.... venis venis ... mi ne scias de kie mi venis;
mi tute perdis la memoron! Plagon sur tiun lokon.
Ĉu mi freneziĝas?" "Trankviliĝu, kamarado, ankaŭ
mi ne povas memori de kie mi venis, sed iel mi ne
sentas ĝenon per tio. Supozeble la fenomeno estas
facile klarigebla; residiĝu". "Sidiĝu ... trankviliĝu?
Vi ankoraŭ ne konas min" kaj li prenis la pordo-
anson kaj forte tiris ĝin.... Ĝi absolute ne cedis.
"Ni estas enŝlositaj! He, fraŭlino! donu ŝlosilon;
ĉu vi opinias nin krimuloj, ke ni sidas kun ŝlositaj
pordoj?"

"La pordo ne estas ŝlosita. Ĝi estas nur enira
pordo, ne elira", ŝi respondis seke, "Vi rajtas eliri
nur per la Pordo de la Mastro, nur je la ĝusta
horo". Kvazaŭ por pruvi ŝiajn vortojn la pordo
subite glate malfermiĝis kaj Numero Kvar eniris.
"Oni direktis min ĉi tien", li komencis hezite, "Mi
ne ĝuste scias kial...."

"Jes", laŭtis Du, "Ankaŭ ni ne scias; neniuj scias
ion klare ĉi tie; se vi volas agi saĝe, tuj forlasu ĉi
tiun sonĝlandon". "Ĝi ŝajnas al mi ne malbona",
respondis Kvar palpebrumante kiel iu veninta de
malforta en plifortan lumon; kaj li scivoleme
ĉirkaŭrigardis. Sammomente Numero Unu reaperis
ĉe la kubuto de Du. Ĉi tiu ekdemandis, "Kie vi
forrestadis? Ĉu vi trovis elirejon en ĉi tiu damna
konstruaĵo". "Eliri? Ĉu vi estas freneza? Kiu volus
eliri de ĉi tiu rava loko? Mi trovis tiom da interesaj
aferoj ĉie; vi ne povas konjekti eĉ. Kion ni ekvi-
detis de la angulo estis nura parteto. Mi renkontis
tiom da homoj kaj havis tiom da aventuroj! Ho,
mi estas laca nun, sed post ripozo, mi deziras
provi vojaĝon en la alian direkton".

"Vi parolas pri vojaĝoj en nuraj ĉambroj? Ĉu
vi efektive trovis ion tie kio estas alia ol ĉi tie?"

Interrompis la parolon la voĉo de la sekretariino
"Numero Du!" ŝi vokis, "La Mastro nun pretas vidi
vin; nun estas via horo". "Sed.... sed...." li bal-
butis, "Ne estas mia vico. Unu atendis la plej
longe". Ŝi skuetis la kapon, "Nur la Mastro difinas
la vicojn; vidu, lia pordo komencas turniĝi". Ŝi
pravis. Helega lumstrio ekaperis ĉe la pordo-
rando. Ŝi denove klinis la kapon super la skribla-
boron. "Faru prokraston!" li petis krude, "Li igis
min atendege. Li do iom atendu min". Per unu
komanda signo, ŝi venigis lin al sia tablo.

Li rigardis malsupren kien ŝi montris, al la
maŝino super kiu ŝi tiel seninterrompe laboris.
"Ne!" li kriis, kovrante al si la okulojn. "Mi ŝanĝis
la opinion. Mi havas ankoraŭ multon por fari ĉi
tie; mi volas aŭskulti al la rakontado de Unu kaj
poste akompani lin al la aliaj regionoj".

Ŝi skuis la kapon denove, kvazaŭ al malobeema
infano kaj ankoraŭfoje montris al la maŝino. Li
ekfuriozis. "Vi ne estas tajpistino kaj tio ne estas
skribmaŝino. Kamaradoj! ĉi tiu inaĉo estas spio-
nino; ĉiun agon, ĉiun vorton; ĉiun penson eĉ, ŝi
registras ĉi tie. Gardu vin". Sed malgraŭ lia plen-
gorga kriado la aliaj ŝajnis ne aŭdi. Ili eĉ aspektis
palaj kaj malprecizaj kvazaŭ elfokusigataj. Tra-
blovo eklevis sin; malvarma, subtila, sed rapide
plifortiĝanta. Li sentis, ke ĝi premas lin en la
direkton al la pordo, kiu daŭre malfermiĝas en-
lasante lumon apud kiu la lumo en la ĉambro
aperis krepuskeca, tiel ke, objektoj kaj homoj
fariĝis ĉiam malpli videblaj. Nun li sentis kvazaŭ
li estus en funelo kies elirejo estas la pordo; funelo
tra kiu uragano fluegis nekontraŭstareble portante
lin al la nun vaste malfermita pordo. Per lasta
fortostreĉo li kolektis sian spiron kaj eligis, "Ne!
Ne nun, poste.... mi ne volas...." Sed la ven-
tego forportis lin kaj liajn kriojn kvazaŭ velkin-
tajn foliojn; li preterdrivis tra la pordejon. La
klapo silente sin fermis.

La sekretario prenis liniilon kaj faris strekon
trans unu el la multaj bendoj kiuj senĉese elvindi-
ĝis tra la maŝino.

Tom Fraser

Novaj Libroj

Duope ricevatajn ni recenzas; unuope ricevatajn ni nur mencias.

*) riceveblaj ĉe U.E.A.

*Marjorie Boulton: EROJ. *) Eld. Stafeto, La Laguna, 1959. 367p. 22.5 × 16 cm. Prezo: 2.40 us. dol. aŭ 35 steloj. VIRINO ĈE LA LANDLIMO. *) Eld. KOKO, Kopenhago, 1959. 196p. 21 × 13 cm. Prezo: 2 us. dol. aŭ 28 steloj.*

Marjorie Boulton estas eble la plej konata kaj ŝatata el la novgeneraciaj poetoj de nia lingvo. La fundamenton de sia reputacio ŝi starigis per la poemaro *Kontralte*, kiun sekvis la kelkloke ĉarma sed nepretendema *Cent ĝojkantoj*. Nun per du novaj verkoj, aperintaj samtempe ĉe du malsamaj eldonejoj, ŝi ankoraŭ pli firmigos sian pozicion ĉe la fidelaj legantoj. Unu volumo estas poemaro, la alia estas drametaro.

Kun granda ĝojo mi konstatas, ke la nova 367-paĝa poemaro *Eroj* (la plej dika originala kolekto de unusola poeto ĝis nun aperinta en Esperanto!) montras realan evoluon. Enestas ĉiuj antaŭaj ingrediencoj de ŝia verko (kiuj estas cetere pli discipline dismetitaj ĉi tie), sed aldoniĝis ankaŭ novaj, inkluzive refreŝigan kaj aŭtentikan satiremon en la poemo "Jurnalo":

"... filmstelo pli valoras ol doktoro,
murdisto pli ol flegistino famas..."
kaj:

"... ke ĉiu var', en bruo fanfaronas,
inter plej bonaj, estas la plej bona",
kiu lasta, kompreneble, celas la komercan reklamadon. Krom tio, ŝia lingvaĵo, ne perdinte klaran kompreneblecon, gratulinde akiris plian semantikan densecon, t.e., ĉiu vorto en ŝiaj novaj verkoj laboras, kio antaŭe ne ĉiam okazis. Ĉar verkisto, kiel ĉio alia, devus ĉiam progresadi, mi ĝojas, ke f-ino Boulton nepre faris tre senteban progreson, kaj la nova volumo, tute precipe kelkaj ĝiaj partoj, devigas agnoski ĝin kiel unu el la atentindaĵoj lastatempe aperintaj en iu ajn lingvo.

Plej grava estas la poemo *Eroj*, kiu reprezentas la apogeon de ŝia ĝisnuna tuta verkaro. La "eroj" estas *Tero*, *Libero*, *Vero* kaj *Mistero*, kiuj, kvankam unuavide ili estas apartaj poemoj, tamen formas kvar facetojn de unu longa poemo, kion pruvas la multaj fadenoj kaj figuroj, kiuj interplektiĝas kaj ripetiĝas tra la tuto. En tiu ĉi poemo f-ino Boulton, per versoj ne-tro-subjektivaj, majestaj kaj digne homaranismaj, atakas la profundajn ĉefproblemojn de nia jarcento, kaj per sia kuraĝa kaj senkompromisa sinteno

pravigas la rolon de poeto en la socio. La ero *Libero*, ekzemple, enhavas pravan realecan atakon kontraŭ pluraj fiaĵoj de nia epoko, ekz-e la rasismo:

*La nigra dorso vipon sentas,
komprenas bone; ne diskursu!
Li restu en la propra loko;
li estas preskaŭ besto, tiu;
lin batu tuj post ekprovoko,
li nur laboru kaj nesciu!*

kaj la torturoj:

*Tiu ekshomo iam estis
homo; ekzistis dum semajn'
en sekretejo; poste restis
io dironte ion ajn;
oni fortiris memestimon,
ungojn kaj dentojn kaj animon.*

Mi salutas ŝin. Estas necese, de tempo ŝovi la nazon de la homaro en la ekskrementon per kiu ĝi malpurigadas sian planedon. Pri tiaj fiaĵoj respondecas ĉiu el ni; la poetoj ne permesu, ke ni ignoru tion! Sed, estante poeto, ŝi ne ĉiam tiel krude-didakte traktas siajn temojn en tiu ĉi ĉefverko. Ŝi trovas simbolon en la papilioj (kaj en ĉiuj belaĵoj de la naturo, kiujn ŝi, pli ol iu ajn alia nia poeto, vivigas por ni):

*Eksplodas papilioj,
koloroj el la koto,
flugantaj antaŭscioj
pri ĝojo de l' naskoto;
flugantaj ĉielarkoj,
sur ventoj parfumblovaj,
tremantaj vivaj sparkoj
de vivoj estopovaj;
lumtremas ĉirkaŭsupre
miloj da galaksioj;
lumas arĝente, kupre
kaj ore, papilioj.*

Se nur pro tiu ĉi verko "Eroj", ĉiu esperantisto devus posedi la volumon.

La poemo "Eroj" ampleksas 43 paĝojn, kaj se oni ricevas 40 paĝojn da granda poezio el 300, oni rajtas esti pli ol konenta. Tamen la cetero de la volumo, kvankam ĝi ne povas atingi la nivelon de "Eroj", nepre valoras. El ĝi plej elstaras la naturminiaturaj, kiuj troviĝas inter p. 256 kaj p. 281, ekz-e:

*Zorgema vento kombas, kombas ade
la griziĝintajn bulklojn de la maro,
tre milde, flegistine kaj kompate,
sur febra, sulka frunto de la tero,
kaj kiuj abundas je viglaj bildigaj
versoj entuziasmigaj kaj rivelecaj:
La verda pego saltas
sur verda sikomoro....*

Mi ne disponas spacon por pli detale trakti tion, kio restas. Kion fari? Eble mi nur menciuj kelkajn titolojn de aliaj poemoj, kiuj ŝajnas al mi elstaraj en tiu ĉi elstara kolekto. Ne multe malpli grava ol "Eroj" estas la dua longa poemo "Provizore". El la aliaj, mi rekomendas al vi precipe: "Venuso kaj Vulkano"; "Preĝo de katido"; "Omaĝo al Pierre Vidal"; "La naskiĝo de geniulo" ("kiam la poplo staros sen foli", la steloj brilos tra la branĉoj nudaj"); "Vintra sceno". Eble mi devis ankaŭ mencii, ke kelkfoje la iom pli flusubtilaj ritmoj montras ŝian teĥnikan progreson.... Kaj nun, bonan apetiton, karaj legantoj!

Tiun volumon eldonis Stafeto. Alia grava eldonejo, KOKO, eldonis la drametaron *Virino ĉe la landlimo*. Dramoj originalaj, eĉ unuaktaj, estas raraĵo en nia lingvo; krom tio, la unuakta dramo estas treege malfacila formo. En la daŭro de unu akto, oni apenaŭ havas tempon soldigi karakterojn kaj malvolvi situacion; oni devas tute simple ĵeti la aŭskultantaron en la mezon de la afero. Oni devas skizi karakterojn per kelkaj linioj. Tamen tiu formo povas ankaŭ esti tre sukcesa. F-ino Boulton meritas gratulon, ĉar ŝi entreprenis sufiĉe konsekvence la verkadon de tia kolekto, tre taŭga, kiel por serioza prezentado, tiel ankaŭ por lingva ekzercado de progresantoj. La kolekto ampleksas 15 drametojn ĉiaspecajn, ekde verstragedio ĝis plej leĝera farso.

La taksado de la drametoj estas tre malfacila, se oni ne vidis ilin sur la scenejo. Certe, kelkaj estas sufiĉe ambiciaj ("Virino ĉe la landlimo"; "Ĉe l' akvo de forgeso"; "Liberiĝo") kaj pritraktas temojn gravajn kaj profundajn (krom la jam menciitaj, ankaŭ: "Vaka seĝo"; "La morto de Kabir"), kaj tio en si mem estas laŭdinda. Mi opinias, ke, ĝenerale, ĉiuj ŝiaj drametoj trafe prezentigis, kvankam kelkfoje ili legiĝas iom melodramece: la scenejo, finfine, ne prezentas la vivon, sed interpretas ĝin. Mi certe esperas, ke multaj grupoj kaj teatroj prezentados ilin. Kaj mi varme rekomendas la libron, kies moralaj celoj estas tre altaj (kvankam humuro ne mankas en multaj el la dramoj), al la legantaro.

Tri el la verkoj (ne enkalkulante unu fantaziaĵon por infanoj) estas verkitaj poezie. Tio estas salutinda, ĉar sur la scenejo la poezio povas tute speciale efiki. Tamen la drama deklamado de rimantaj versparoj (kio estas la formo elektita de f-ino Boulton) prezentas apartajn malfacilaĵojn, kaj tion devas helpi fluaj transkuroj de unu versparo en alian. Plej rimarkinde tio okazas en "Virino ĉe la landlimo", kaj mi opinias, ke tiu dramo aŭdiĝos ekzaltenaturece. Mi iomete dubas pri la aliaj du, ĉu eble la versparoj estas tro rigidaj. Sed, ne estante aktoro, mi ne povas esti certa pri tio. En "Ĉe l' akvo de forgeso", eble la formaleco de la

poezio trafe konformiĝas kun la ioma formaleco de la fablo?

Salutinda estas ankaŭ tio, ke la aŭtoro plurfoje prenas sian temon el la esperantista vivo ("Iluzio"; "2060"; "Provludo en la klubejo"; "Maneken-parado"; "La provo"; "La kluba biblioteko"; "La sonĝo de la kursgvidanto").

En mallonga recenzo estas neeble plene pritrakti 15 tute diversajn drametojn. Sekve mi lasos la malpli pretendemajn, kaj diros kelkajn vortojn nur pri la du, kiuj ŝajnas al mi pli gravaj. Ambaŭ estas kontraŭmilitaj, kaj pasie pledas por la paco: "Virino ĉe la landlimo" montras, kiel la milito frakasas la normalan homan rajton je amo kaj trankvila disvolviĝo de la individua vivo; "Liberiĝo" montras, kiel la homa spirito povas venki kruelemon kaj venĝemon.

En "Virino ĉe la landlimo", Maria estas amata de samlandano Mateo, sed mem amas, kaj estas amata de, alilandano Filipo. Ĉe la landlimo, okaze de militkomenciĝo, ludiĝas la tragedio. Dum Maria kaj Filipo adiaŭas unu alian, Mateo alkondukas soldatojn, kiuj mortpafas Filipon kiel "spionon". Pro ŝoko, Maria freneziĝas, kaj Mateo, vidinte la sekvojn de sia "heroeca" ago, mem malesperiĝas kaj serĉas morton, sin ĵetante senarmile en la batalon. Tre efike, f-ino Boulton uzas kiel simbolon la rozojn — tre ordinaran simbolon, kiu tamen per la simpleco mem tre terure efikas. Rememorante dum la kriza nuno la ĝojojn de la paca hieraŭo, Maria demandas:

*Kaj ankaŭ ĉu vi
memoras kiel vi insistis pruvi
amon, per nuda mano deŝirante
rozon por mi? Vi donis ĝin, dirante:
"Jen rozo; delikata la koloro...
pli ruĝas tiu sango el la koro
sur mia fingro. Donus mi abundon
por vi..."*

Filipo:

*Kaj vi... vi kisis tiun vundon.
Ruĝiĝis vi, paliĝis vi, kaj flustris...
"Ho, via amo tiel sale gustis!"*

Poste, dum ili kisas sin, Filipo estas mortpafita. Maria ekkrias:

Ho Dio! via buŝo gustas sale!

Vidante sangon sur siaj manoj:

*Ho, rozoj, rozoj tie floras!
Vi plukis rozon!... Jes, mi rememoras!
Rozon por mi! Jes, rozoj ruĝas ĉie!
Nur ruĝo! Ruĝaj rozoj! Ruĝpasie!*

La rozoj de la paco fariĝis la rozruĝaj sangoj de la milito. Kaj Mateo, ekkuronte en la batalon, krias:

*Venu doloro, venu fino, fino,
nur fino kaj forgeso! Ho soldatoj,
murdu nur min, miaj frenezaj
fratoj!
rozoj de morto moku min,
surbruste,
dekoracioj! min mortigu juste!
Frenezo, frakasado... furiozoj...
blindo... silento... rozoj, rozoj,
rozoj!*

Se tiu dramo finiĝas per freneza malespero kaj tragedio, "Liberiĝo" montras la venĝemon kaj seniluziĝon, kiuj sekvas militon kaj okupacion. Kaj en tiu momento la vere heroa figuro povas atingi dignon preskaŭ preterhoman. Marija (ĉu hazarda estis la simileco de nomoj inter tiuj du ĉefrolantinoj?) estas kripligita de naziaj okupintoj de sia lando. Kiam la sorto alportas al ŝi ŝian torturinton, ŝiaj kamaradoj volas same torturi kaj kripligi lin; sed Marija, ne povante liberiĝi lin, savas lin de la turmentoj, donante al li venenon. Digna, fortika figuro, ŝi respondas al la miraj protestoj de la kamaradoj:

*Vi ĉiuj terure suferis, kamaradoj;
kaj viaj suferoj preskaŭ bestigis vin.
Eble suferoj helpis bestigi lin. Ankaŭ
mi tre suferis; sed mi restis stumpa,
kripla; mi havis longan tempon por
mediti, por suferi, por deziri venĝon
kaj finfine ne plu deziri venĝon. Kaj
mi vidis, ke suferado ne plibonigas la
homojn; ĝi kutime malplibonigas ilin...
Oni suferigas; kaj tial la viktimo volas
suferigi, kaj li suferigas aliajn kiuj
rezulte volas suferigi, en senĉesa ĉeno
de sufero, venĝo kaj sufero... mi nur
finfine komprenis, ke iu devas rompi
la ĉenon; kaj tion oni faros nur per
pardono kaj amo.*

Kun matura arto, f-ino Boulton ne tie finas la dramon; fulmofrape sekvas ankoraŭ unu tragika okazaĵo, kiu kvazaŭ substrekas samtempe la konkludon de Marija kaj la nanecan senpovon de la individuo kontraŭ sia sorto....

Mi opinias, ke multaj legantoj konsentos kun mi, ke f-ino Boulton estas taŭga disĉiplo de Baghy kaj lia pasia homaro. Ŝi plenumas necesan rolon en nia homama literaturo. W. Auld

TIEL PROFUNDA ESTAS LA NOKTO* de Villy E. RISØR, eld. Libro-Servo de Centra Dana Esperanta Ligo, 112 p. 13 × 21, prezo: 9 danaj kronoj. Tradukis kaj kontrolis: (listo de 9 nomoj).

La unua penso, kiun mi havis dum la legado de tiu ĉi libro, estis demando, kial oni tradukis esperanten tiun dandlingvan verkon? La elekto ŝajnas surpriza: kiam atendas tradukadon tiom da valoraj verkoj en ĉiuj lingvoj, kial ĝuste doni la preferon al verko sen troa signifo, verko tia, ke ĉiutage aperas simile bagatelaj. Evidente, ne same pensis la naŭ tradukintoj.... aŭ ĉu eble la aŭtoro estas "favora al Esperanto"?

En tiu volumo, li, la aŭtoro, celas verŝajne eldiri la impresojn al li lasitajn de trakurado-restado tra la nigra Afriko, ĉefe en ĝia meza, tropika, parto (eĉ ne mankas "nigrula" sperto en Parizo).

Sed dum oni atendas la interesajn notojn de granda vojaĝanto, oni trovas, se ne ekskluzive, almenaŭ tro ofte, la kutimajn kliŝojn pri la profunda kaj

malluma arbarego kaj ĝiaj misteraĵoj, pri la du rasoj, nigra kaj blanka, apudsed ne kun-vivantaj, pri la bone konataj drinkemo kaj diboĉemo de la laste nomita. Fakte, la du ĉefaj roloj, kiel en la detektivromanoj, apartenas al vĥskio kaj al virinoj. Oni ricevas la impreson, ke la intenco de la aŭtoro estis precipe tikli, se ne ŝoki, la leganton: efektive, la noveloj preskaŭ senescepte temas pri seksaj okazaĵoj, kompreneble la plej pikaj — inter nigraj kaj blankaj, blankaj inter si, adultaj, sen forgesi unu kun pastro! Nun mi scias: en Afriko, la nigruloj tamburas kaj amoras, la blankuloj drinkas kaj amoras. Ĉu la negroj laboras kaj suferas, ĉu la blankaj mastroj havas problemojn, ĉu ili rigardas la aliajn homojn aŭ ne, tion la aŭtoro ne instruas al ni. Kredeble, tian intencon li ne havis.....

La traduko facile legiĝas. Bedaŭrinde ĝi povas lasi al nova esperantisto aŭ al ne sufiĉe atenta leganto falsan opinion pri kelkaj gramatikaj aŭ vortaraj punktoj. Ĉu estis necese ariĝi tiomope por enlasi (se ne enmeti) tiom da neĝustaj formoj? Temas ne pri unu/du neglektaĵoj, sed pri nemalmulta kolekto da eraroj. Plej gravaj estas la malatento al (aŭ nescio pri) la transitiveco aŭ netransitiveco de la verboj (balancis anst. balanciĝis p. 17, kaj multaj similaj ĉe sperti, renversi, kirli, movi, etendi, droni, eksciti), kaj la konstanta ignorado pri la regulo de la tempoj relativaj en subpropozicioj (li sentis, ke.... li denove povis, anst. povas, p. 39, kaj tre multaj similaj). Alia grava: uzo de adverba participo rilatanta al objekto anstataŭ al subjekto (Mi vidis... ŝipojn kun veloj saltfrapante, anst. saltfrapantaj, p. 43; Liaj dentoj lumis... kun la cigaredo banancante, anst. balanciĝanta, p. 101). Kaj diversaj aliaj.

Oni trovas ankaŭ la jenajn nenece-sajn neologismojn: virila (vira, vireca), indolente (senzorge, apatie), periero(!) (france: quart Perrier), mizetvalso (france: valse musette), sloŭfokso (angle: slow-fox). Kelkaj strangaj esprimoj: teksajmatadoro, li kuradis sin.... kaj aliaj. La franca vorto "bistro", nesubstrekita en la teksto, povus kredigi, pro sia o-finaĵo, ke ĝi estas esperantaĵo.

La libron ornamas interesaj desegnaĵoj. Papero kaj preso tre bonaj.

Resume, tre bona libro por libidomatoroj, unuflanke, kaj por... kursgvidantoj, aliflanke (lernu per la eraroj)!

Roger Bernard

PRIVILEGIA VOJO AL LINGVOSCIO: ESPERANTO* de Vilho. Setälä. Fondumo Esperanto, Helsinko, 1958, 124 paĝoj, prezo 300 finnaj markoj.

Ofte ni aŭdas la rimarkon: "Mi volonte lernos Esperanton, sed mi ne havas tempon viziti kurson, ĉu vi povas

proponi al mi lernolibron por memstudado?"

Jen la respondo: Nova lernolibro de Vilho Setälä. Ĝi fakte estas moderna Ĉe-kurso en skriba formo, sen uzo de vortaro, sen rekta teda klarigo de gramatiko kaj sen bezono de instruisto. En nia teknika epoko estas eĉ eble por izolita memstudanto kontroli sian prononcadon per sonbendo de spertulo, ekz. pere de la magnetofona servo de U.E.A.

La plenkreska lernanto, ĉar certe la libro pli taŭgas por plenkreskuloj ol por infanoj, studas, dum li amuziĝas per la aventuroj de ĉarma kokofamilio. Ĉu ne tro infanece? Tion oni ne sentas, ĉar la ĉarmaj bestoj kondukas kiel homoj, kies ĉiutagan vivon ni sekvas tra ĉiuj monatoj de la jaro.

La principoj de la lernolibro estas laŭ la plej modernaj instrumentoj por lingvoinstruado. La aŭtoro komencas per la plej oftaj vortoj en nia ĉiutaga lingvo, kaj amuzaj desegnaĵoj en la margenoj kondukas al la kompreno de ĉiu nova vorto, aŭ simplaj logikaj klarigoj per jam konataj vortoj klarigas la novan (foje eĉ tro logike: malblanka por nigra). La plej gravaj vortoj en Esperanto troviĝas fojon post fojo en la libro, kaj finstudante ĝin oni majstras 1300 vortojn, sufiĉe por legi ordinarnajn librojn.

La tre bonaj kaj amuzaj ilustraĵoj estas de la finna artisto Alho. La tuta aspekto cetere estas tre agrabla. Nebindita, la multkolora kovrilo konsistas el glata papero, praktika por lernolibro.

Komence estas mallonga instrukcio por la lernanto pri prononcado k.t.p. La lernolibro validas por lernantoj de kiu ajn nacio, nur estas necese traduki la instrukcion. La eldonisto eldonis reklaman kajeron en finna lingvo, samtempe propagandilo por Esperanto kaj la libro. Ĝi interalie enhavas ĉefartikolon pri la hodiaŭa lingvoproblemo, supervidon de la gramatiko de Esperanto kaj mencias la eblojn por ĉiutaga uzo de Esperanto en ĉiuj kampoj. En tre bona maniero ĝi donas klarigon de la titol-slogano.

Krom en Finnlando la libro ĝis nun aperis en Svedujo, kaj la aŭtoro deziras doni solrajton al unu eldonisto en ĉiu lingva aŭ geografia tereno laŭ certaj kondiĉoj. Pri tiuj oni turnu sin al: Fondumo Esperanto, Vilho Setälä, Esperanto-tie 4, Matinkylä, Finnlando.

Roma Thorsen

INITIATION theorique et pratique à la langue internationale ESPERANTO. Dr. Pol. Denoël. Steleldo, Liège (1959).*

Novredaktita laŭ eldono de la jaro 1934. Franclingva lernolibro, dividita en dek lecionoj kun multe da gramatika materialo en malmulte da loko, entute 67 paĝoj, sed en la manoj de vere lerta instruisto, kiu bone scias vigligi la donitan materialon, kaj eluzi la eblecojn de la libro, ĝi vere estas

valora, sed ĝi postulas multe da laboro ne nur de la instruisto, sed ankaŭ de la lernantoj. Lernolibroj por komentantoj devas esti kiel eble plej facilaj por la lernantoj, do se eble oni ĉiam devas uzi formojn similajn al la naciaj. Ekz. laŭ franca lingvo-uzo oni havas la formon: Quel âge as-tu? = kiom da jaroj havas vi? sed sur paĝo 38 ni legas: L'AGE. Question: Kiomjara estas vi? Quel âge as-tu? Kial oni almenaŭ ne mencias ambaŭ formojn? La gravuraĵoj pri anta, inta kaj onta estas imitindaj. La libro finiĝas per rakonto de la Brusela ekspozicio en la jaro 1958, kie s-ro Lagranda resumis siajn pensojn per jenaj vortoj: "Ni konstatis hodiaŭ, ke spite la naciismojn, spite la koloron de sia haŭto, la homoj povas mondscale kunigi siajn fortojn por starigi komunan verkon. Se la homaro plie alprenus komunan mondlingvon, ĝia povo estus senlima". Veraj vortoj!

Leo Sogaard Hansen

ALLAS ANDRA SPRÅK, ESPERANTO, kurs för radio ock studiegrupper. Ernfrid Malmgren. Förlagsföreningen Esperanto, Malmö, 1957.*

Svedlingva lernolibro, dividitaj en 24 lecionoj, uzebla por radio kaj studrondoj. En la unuaj lecionoj la novaj vortoj estas prezentitaj per desegnaĵoj, poste nur per vortolistoj en sveda lingvo. La diversaj reguloj kaj gramatikaĵoj estas kolektitaj en la malantaŭa parto de la libro, kiu finiĝas per listo de ĉiuj uzitaj vortoj. La 126 paĝojn oni tralaboras kun ĝojo kaj profito. Multaj facilaj demandoj, diversaj ludoj, krucvortenigmoj, anekdotoj kaj kantoj vigligas kaj amuzigas la lernadon. Se oni nur post la traskado de la interesa libro sekvus la konsilon donitan en la lasta leciono: Uzu la lingvon en la praktiko, mi garantias, ke via vivo pliriĉiĝos!

Leo Sogaard Hansen

IL LATINO LINGUA INTERNAZIONALE? de Carlo Agostini & Pierluigi Marelli. Federazione Esperantista Italiana, Ufficio Informazioni (via G. Galilei 22, Torino, Italia), Documento N. 4, Milano 1959. 32 paĝoj.*

Tiu itallingva broŝuro resumas klopodojn reigi la latinan lingvon vivanta internacia lingvo, ĉu en ĝia klasika ĉu en pli malpli simpligitaj formoj, kaj konkludas ke tiaj klopodoj estas vanaj kaj ke Esperanto estas "latino internazionale".

Poŭl Skårup

ESPERANTO FOR BEGINNERS, de Montagu C. Butler. 24-paĝa elementa lernilo. Prezo 6 p.*

ESPERANTO AND YOU. 12-paĝa informilo pri Esperanto.

Ambau broŝurojn eldonis en angla lingvo la Brita Esperantista Asocio.

Poŭl Skårup

TRI SATIROJ. De Radoje Domanović, Fran Milčinski kaj Branko Ćopić. Eldonita de Slovenia Esperanto-Ligo. Prezo 2 guldenoj.*

Ĉiuj tri aŭtoroj en tiu ĉi prezento troviĝas inter du ekstretoj.

Radoje Domanović plej emas al la klasika principo: ridindigi la homaron per milde ironia komentario; Fran Milčinski petolas kun individua homa kaprico, kondukante ĝin en absurdon, dum Branko Ćopić fandas unikan karakteron kaj apartan situacion en komedion, kiu spegulas la nekonsekvencan reagemon de la homa animo ĝenerala al certaj influoj. La unua estas la plej ortodoksa satiro; la dua estas la plej ridiga; la tria prezentas la plej interesan karakteran skizon.

Radoje Domanović trovas rimedon por sia registro de homaj raciomankoj en formo de pensanta bovo, per kiu li povas kvazaŭ objektivite konjekti, akceptante nenion apriorie, la kaŭzojn de nacia kaj praula fiero. Tiel li liveras al si satirobazon tre konvenan, kaj sola domaĝo estas, ke li ne pli ekspluatis ĝin: la trankvila, senurĝa disvolviĝo atendigas, ke la bova pensvagado poste ampleksos aliajn sferojn de la homa animo, sed anstataŭe ĝi iom abrupte haltas.

En la 'Mortanoncoj' de Fran Milčinski, spertulo pri la kunmeto de mortanoncoj aŭdinte de sia kuracisto, ke — interalie — li rajtas trinki "nur la mineralakvon, po unu kulero tage", enrampas la liton konvinkite, ke li estas mortonta, kaj por pasigi la tempon ekkomponas mortanoncon por si, kun tre amuzaj rezultoj. Jen el du specimenoj: "... multjara fidela membro de konstanta ĉetabla kolektivo en 'Spongo', abonanto de multaj gazetoj, la patro de kvar infanoj, filo, pranepo, onklo, baptonklo, bofrato, subleŭtenanto, kuzo, bofilo, edzo kaj frato, dufoje plensukcese inokulita kontraŭ la variolo..." kaj

"..... la lasta honorigo de lia persono okazos tiun kaj tiun tagon. Tiu lia lasta honorigo estos samtempe lia la unua."

Poste la situacio kulminas tre amuze.

Kiel mi jam sugestis, la ĉefa forto de Branko Ćopić kuŝas en la skizo de lia ĉefkaraktero: stulta, egocentra, kruda, varmkora kaporalo Nikoletina Bursać. En tiu ĉi volumo li rolas en du apartaj eroj, kaj ne surprizas min konstati de la Aŭtoronotoj, ke li ankaŭ troviĝas en aliaj, ĉar la ŝajnaj kontrastoj de tiu ĉi karaktero fariĝas pli kaj pli konvinkaj pri aŭtentika unueco des pli oni legas.

La tradukoj estas entute glate klaraj, sed pli bone ol traduki laŭvorte nacian idiotismon kaj poste senti neceson klarigi ĝin per noto, ĉu ne reprodukti per konvena Esperanta, laŭeble el la Zamenhof-proverbaro? Cetere, pluraj el la klarigoj ĉi tie estas nenecesaj.

Kvar plenpaĝaj skizoj sprite ilustras la volumon.

J. F.



45-a Universala Kongreso de Esperanto

Bruselo - 30.VII — 6.VIII.1960 - Belgujo

Sub la Alta Protektado de
L. M. Baŭduino, Reĝo de la Belgoj

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 5 Decembro 1959

T.E.J.O.-kongreso :

La Loka Kongresa Komitato donis sian aŭspicion al la 16-a Junulara Kongreso de T.E.J.O., kiu okazos en Rotterdam de la 23-a ĝis la 30-a de julio 1960. D-ro W. Drees, estinta ĉefministro kaj nuna honora ministro de Nederlando akceptis esti honora protektanto de tiu kongreso.

Kongresejo :

La Kongresejo de la 45-a Universala Kongreso estos la tuta nova Palaco de Kongresoj de Bruselo, kiu situas sur la monteto de Belaj Artoj je 100 m. de la centra stadidomo en la koro de la urbo. En la kongresejo troviĝas modernaj kaj funkcicelaj salonoj por la kongresaj servoj kaj laboroj, kafejo restoracio kaj poŝtoŝtanco. Antaŭ la konstruaĵo etendiĝas plaĉa ripoziga parketo gracie ornamita per artaj akvoŝprucoj.

Senpagaj vojaĝoj al Bruselo :

Unuiĝo Esperantista Franca lotumos unu senpagan vojaĝon al la Universala Kongreso inter siaj membro-apogantoj. La Pariza Federacio de Unuiĝo Esperantista Franca decidis asigni alian senpagan veturadon kaj restadon al Bruselo al instruist(in)o el la eksperimentaj kursoj en Versailles, kies klaso havos la plej bonajn rezultojn.

Statistiko :

(ĝis fino de novembro) Argentino 1, Aŭstralio 1, Aŭstrujo 4, Belgujo 110, Brazilo 5, Britujo 27, Bulgarujo 5, Ĉeĥoslovakio 1, Danlando 5, Finnlando 1, Francujo 33, Germanujo 11, Hispanujo 2, Hungarujo 1, Italujo 6, Japanujo 3, Jugoslavio 8, Maroko 1, Meksiko 1, Monako 3, Nederlando 17, Norvegujo 3, Novzelando 9, Pollando

24, Svedujo 16, Svisujo 10, Unuiĝinta Arabio 1, Urugvajo 1, Usono 1.
Entute 304 el 28 landoj.

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 6 Decembro 1959

Fakkunvenoj :

Anoncas Fakkunvenon :

— Skolta Esperantista Ligo pri : "Kiel solidigi la ĝisnunajn atingojn?" Adreso : S-ro J. Van Gulck, Wolfjagerslei 40, Borgerhout (Antverpeno), Belgujo.

— Universala Ligo, Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando.

— Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Adreso : F-ino V. C. Nixon, 183 Woodlands Park Road, Birmingham 30, Britujo.

— Internacia Asocio de Juristoj-Esperantistoj pri : "La pozicio de advokato en diversaj landoj". Adreso : S-ro Sven Ziegler, Bjernedevej 62, København Brh. Danlando.

Senpagaj vojaĝoj :

La Esperantista Societo de Marseille disponigas du senpagajn veturadojn kaj partoprenojn en la Universala Kongreso kiel premion por siaj plej bonaj kursanoj.

Komunaj loĝejoj :

La Loĝiga Servo de L.K.K. organizis taŭgajn komunajn loĝejojn je prezo de 45.— b.fr. por persono kaj por nokto, inkluzive de matenmanĝo.

Bankedo :

Antaŭ la Kongreso Balo okazos en la Madalenaj salonoj komuna festa bankedo kun orkestra muziko.

Afiŝo :

La Centro de Informado de la Urbo Bruselo decidis eldoni turisman afiŝon, cm. 60 × 100, en Esperanto. Lokaj esperantistaj societoj aliĝintaj al Landaj Asocioj povas ĝin ricevi mendante ĉe : 45-a Universala Kongreso de Esperanto, Bruselo.

G. C. Fighiera,
Konstanta Kongresa Sekretario

JARLIBRO 1959, DUA PARTO

Pro la tre frua aperigo de la decembra numero de "Esperanto" 1959, la eldono de la Dua Parto de la Jarlibro estis planita meze de decembro, proksimume je la Zamenhof-tago. Pro ĝia granda amplekso tio prokrastiĝis unu semajnon, tiel ke ĝi vidis la lumon la 23-an de decembro, ĝuste antaŭ Kristnasko. Tio kaŭzis, ke la plimulto de niaj membroj ricevis ĝin nur en januaro, ĉar ja en tiuj jarfinaj tagoj la poŝto estas absolute superŝutita kaj ĉio suferas prokraston.

Ĉi tiu Dua Parto de la Jarlibro donas sennombrajn informojn, unue pri la laboroj kaj mastrumado de U.E.A. mem, kaj ankaŭ pri la landaj kaj fakaj asocioj. Ni varme rekomendas al ĉiuj tralegi ĝin kun granda atento.

Ankaŭ en tiu ĉi Jarlibro ni publikigis terminaron; post la Gastronomio, interesa al ĉiu homo kiu ŝatas bonan manĝon, nun pli teknikan, pri konstruado de ŝoseoj. Certe ĝi interesos niajn inĝenierojn kaj aliajn teknikistojn.

La aperigo de tiu ĉi Jarlibro signifas, ke la kompleta Jarlibro 1959 ampleksas 814 paĝojn, kio estas multe pli ol iam antaŭe. En la momento kiam ni skribas tiujn ĉi liniojn, la Jarlibro 1960 jam estas en plena preparado kaj ni esperas ke ni povos publikigi ĝin frue en la printempo.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

NOVJARAJ SALUTOJ

Alvenis en la jarfinaj semajnoj kaj ankaŭ pli poste amaso da bondeziroj okaze de la festotagoj kaj la Nova Jaro al la Centra Oficejo kaj al la oficejo de C.E.D. Kun granda ĝojo ni akceptis tiujn sennombrajn esprimojn de simpatio kaj amikeco. Ankaŭ el kunvenoj okaze de Zamenhof-solenaĵoj atingis nin multaj salutoj kaj solidarecesprimoj, kiuj ĝojigis kaj kuraĝigis nin. Ĉar estas maleble al ni, respondi al ĉiuj aparte, ni de tiu ĉi loko plej kore dankas pro ĉiuj afablaj sendaĵoj kaj plej varme reciprokas ĉiujn bondezirojn. Ke vi ĉiuj en tiu ĉi jaro jam rikoltu la fruktojn de viaj streĉoj dum la Zamenhof-Jaro !

Prof. I. Lapenna
Honora Direktoro de C.E.D.
M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

La Zamenhof-Solenaĵoj

Ĉie en la mondo okazis en decembro, omaĝe al d-ro Zamenhof, grandaj kaj malgrandaj festoj, tiom multaj, ke ne eblas menciigi ĉiujn en nia revuo, sed ĉiuj solenaĵoj eniros la Memorlibron pri la Zamenhof-Jaro, kiu libro aperos post kelkaj monatoj. La Redakcio

La Redakcio

varme dankas pro la multaj salutoj kaj bondeziroj alvenintaj okaze de la Kristnasko kaj Novjaro kaj per ĉi tiuj linioj tre kore reciprokas.

Kirsten Zacho
redaktorino

*Tuj pagu viajn
kotizojn 1960 !*

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM-2 NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

La 1-an de januaro 1960

N-ro 323

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de decembro kaj ankaŭ por komparo je la fino de decembro 1958 :

	1958	1959
Asociaj membroj	20440	25135
Individuaj membroj		
MJ	770	895
MA	4899	5384
MS	532	526
Pat.	5	7
DM	306	339
HM	46	45
JMJ	18	29
JMA	122	186
	6698	7411
	27138	32546

DELEGITOJ

Alĝerio

Constantine (Constantine) FD (tendumado): S-ro René Lavalée, tribunala interpretisto, Oued Athmenia.

Aŭstrujo

Graz (Steiermark) FD (religio : bahaismo) : S-ino Leopoldine Heilinger, dommastrino, Griesplatz 13 p 1.

Klagenfurt (Kärnten) D : S-ro Leonhard Schmid, ĉeflerneja direktoro, Ziggulnstr. 11.

Linz (Ober-Österreich) VD : S-ro Josef Mraz, lerneja konsilisto, Weigunyst. 7/II.

Brazilo

Juazeiro (Bahia) D : vakas.

Rio de Janeiro (Distrito Federal) FD (turismo) : F-ino Lila Teixeira, ŝtatoficistino, Praia de Botafogo 522.

Britujo

Launceston (Cornwall) D: S-ro Thomas J. Woodall, laboristo ĉe farmbieno, Trethevey Cottage, South Petherwin.

FD (libervolaj laborkampoj) : la D.

Leeds (Yorkshire) FD (specialisto pri modernaj komercaj kontoraj sistemoj) : S-ro Joseph Kenneth Challing, reprezentanto presejaj sistemoj, "Bonapenso", 84, Moseley Wood Drive.

Maidstone (Kent) D : vakas.

FD (muziko) : vakas.

Scunthorpe (Lincolnshire) D : vakas.

Bulgarujo

Loveĉ D : S-ro Ivan Deliev, juristo, ul. Kiril i Metodi 25.

VD : vakas.

FD (juro) : la D.

Plovdiv D: S-ro Penko Stoev, pensiulo, str. "N. Vapcarov" 52.

Ĉeĥoslovakujo

Jihlava (Moravio) FD (medicino): D-ro František Kubica, kuracisto, Jiráskova 10.

FD (amatora fotografado) la FD (medicino).

Moravsky Kočov (Morava) D : S-ro Josef Pařízek, lernejestro, poŝto Valšov.

Danlando

Aalborg (Jylland) D : vakas.

København FD (farmacio) : vakas.

FD (sociaj aferoj) : F-ino Merete Schneekloth, instruistino, Blidah Park 6, Hellerup

Odense (Fyn) D : vakas.

Toustrup (Jutlando) D : vakas.

Vinderup (Vestjylland) D : S-ro Knud Aage Andersen, instruisto, Kapelvej 3.

Finnlando

Helsinki FD (ŝak-sporto) : S-ro Ilmari Rautio, instruisto, Fredrikinkatu 58 B 38.

FD (turismo) : vakas.

Kajaani (Oulun lääni) D : S-ro Juhani Kiviluoto, instruisto, Poŝkesto 16.

FD (turismo) : la D.

Turku (Turun ja Porin lääni) FD (terkulturo) : S-ro Elias Syrjänen, terkultura konsilanto, Puutarhakatu 11-13 D 163.

Francujo

Arras FD (arkitekturo) : S-ro Henri Philippe, arĥitekto-arĥeologo, 8 Rue Pasteur.

Aytre (Charente-Maritime) FD (ŝakludo): S-ro René Menu, trajnoficisto, Cité Guillocheau, Rue d'Yves.

Cluses (Haute-Savoie) D : S-ro Jean Champion, teknika profesoro, Ecole Nationale Professionnelle d'Horlogerie.

Fécamp (Seine Inférieure) D : vakas.

Lyon (Rhône) D: F-ino Jeannine Perra, instruistino, 68 Montée de l'Observance 68 (8N).

Nice (Alpes Maritimes) FD (budhismo): vakas.

Paris (Seine) FD (fervojoj) : S-ro Lucien Leclercq, fervojisto, SNCF VB dz 18 rue de Dunkerque.

FD (hebrea lingvo) : S-ro André Cherpillod, kontisto, 46 rue Joseph de Maistre.

Germanujo

Augsburg (Bayern) FD (turismo) : S-ro Adolf Gentner, komerca dungito, Augsburger Str. 37.

Berlin JD : vakas.

Edenkoben (Rheinland-Pfalz) D : S-ro Helmut Rössler, gimnazia instruisto, Klosterstr. 177b.

München (Bayern) FD (PTT) : S-ro Konrad Deubler, telefon-inspektoro, Agnesstr. 5/III.

Wehringen über Augsburg (Bayern) D: S-ro Wilhelm Foag, laboristo, Frühlingstr. 37.

Wiesbaden (Hessen) VD : S-ro Leo Joliet, emerita poŝtoficisto, Assmannshauser Str. 8a.

FD (virinaj aferoj) : F-ino Käthe Frick, sekretariino, Emser Str. 10.

Hispanujo

Tarragona D : vakas.

FD (turismo) : vakas.

Hungarujo

Pápa D : S-ro A. Sándor Császár, oficisto, Meggyes u. 5.

FD (literaturo) : la D.

FD (terkulturo) : la D.

Israelo

Amirim (Galileo) FD (vegetarismo) : S-ro Jeĥezkel Dorn, ĝardenisto, Vegetara Kolonio Amirim, Merom Ha-Galil.

Italujo

Milano FD (farmacio) : D-ro Mario de Conca, apotekisto, Viale Monza 191.

Vercelli (Piemonte) D : S-ro Mario Sola, doktoro pri juro, Corso Italia 22.

FD (filatelo) : S-ro Luigi Praglia, geometristo termezuristo-ŝtatoficisto, Via Luigi Bruzza 5.

FD (juro) : la D.

FD (turismo) : la D (filatelo).

Jugoslavio

Beograd (Srbija) FD (politika ekonomio) : S-ro Pribislav Marinković, profesoro, Bulevar Revolucije 17.

Ljubljana (Slovenija) JD : S-ro Tone Rogelj, studento, Miklošičeva 7.

Sevnica (Slovenija) D: S-ro Alojz Perc, ŝuisto, Poljska pot 2.

Slavenski Brod (Hrvatska) D : F-ino Zdenka Hag, Gundulićeva 56/1.

Kenjo

Nairobi D : vakas.

FD (botaniko) : vakas.

Madagaskaro

Tananarive D : S-ro Henri Ramanitra, skribisto-interpretisto, Laboratoire de l'Elevage, B.P. 4.

Nederlando

Amsterdam FD (ĵudo-sporto) : S-ro Kees Ruig, maroficiro, Pieter de Hoochstraat 50 I.

FD (maristaj kaj priŝipaj aferoj, navigacio) : la D (ĵudo-sporto).

Bilthoven (Utrecht) FD (fervojoj) : vakas.

Brummen (Gelderland) D : F-ino Dieuwke Noordhoff, instruistino,

Talma-Rustoord, Louiseinrichting.
Utrecht FD (instruado) : vakas.

Pollando

Bydgoszcz FD (medicino): S-ro Walery Wiecko, kuracisto, str. Modrzewiowa 20 m. 15.

Poznań FD (Kemio) : vakas.

Siedlce (Woj Warszawa) D : vakas.

Svedujo

Sundsvall D : S-ro Thorsten Farm, slojd-instruisto, Ludvigsbergsvägen 37.

FD (tipografio) : S-ro Gustav Esberger, tipografo, Bergsgatan 87B.

Svislando

Konolfingen BE (Emmental) D : S-ro Erwin H. Zuber, subĉefo, stacidomo.
St. Gallen FD (fervojo) : S-ro Emil Zuberbühler, staciestro, Hechtacker-str. 11.

FD (filatelo) : la FD (fervojo).

Usono

Brooklyn 3 (New York) FD (edukado) : vakas.

Hillsborough (California) : D : S-ro William H. Schulze, fervojisto, 410 Darrell

Jersey City (New Jersey) JD : S-ro Allan E. Fineberg, studento, 62 Bergen Avenue.

Novato (California) D : S-ro William Walker, fajrbrigadano, 586 Louis Drive.

Power (West Virginia) FD (religio) : Rev. Stephan A. Sinnick, paroĥestro, P.O. Box A.

Sacramento 26 (California) VD : S-ino Frasquita S. Overmire, dommastro, 1301 Eastern Avenue.

San Francisco (California) FD (fervojoj) : S-ro William H. Schulze, fakulo de frajtkostoj, c/o SDCO, 65 Market.

San Francisco (California) FD (liberpensado) : vakas.

Tacoma (Washington) FD (edukado) : F-ino Ruth Culbert, instruistino, 1912 North Monroe.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Beck, D-ro A.K., Sevenoaks, Britujo.
Charlet, F-ino J., Lyon, Francujo.
Sinnick, Rev. Stephen A., Power, Usono.

Slosser-Bresler, S-ino B.M., Gorinchem, Nederlando.

Worrell, S-ro W., Los Angeles, Usono.
Zygmuntowicz, S-ro Władysław, Toronto, Kanado.

PATRONO 1960

1. Higham, S-ro W. H., Liverpool, Britujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1959

516 Wick, S-ro Rudolf, Pöls ob Judenburg, Aŭstrujo.

517 Freitas, S-ro A. Wantuil, Rio de Janeiro, Brazilo.

518 Gaio, S-ro Jorge Manoel, Rio de Janeiro, Brazilo.

519 Pitta, S-ro Hermes, Salvador, Brazilo.

520 Pölöskey, S-ro Árpád G., Budapest, Hungarujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1960

59 Maddern, S-ro Ivan T., Moe, Aŭstralio.

60 Halbedl, D-ro Adolf, Knittelfeld, Aŭstrujo.

61 Bluett, S-ro T.L.C., Truro, Britujo.

62 Challinger, S-ro J.K., Leeds, Britujo.

63 Clarke, S-ro W., Dunfermline, Britujo.

64 Divall, S-ro N.H., New Barnet, Britujo.

65 Dunbar, S-ro Robert, London, Britujo.

66 Gardner, S-ro C.W., Sheffield, Britujo.

67 Kennedy, S-ro D., Bishop Auckland, Britujo.

68 Kennedy, S-ino M., Bishop Auckland, Britujo.

69 Lyes, S-ro N.H.A., Gloucester, Britujo.

70 Miller, S-ro J.R., Stone, Britujo.

71 Pearson, S-ro Maurice, Sheffield, Britujo.

72 Saunders, S-ino A.J., Ventnor, Britujo.

73 Shield, S-ro W.J., Wallasey, Britujo.

74 Sinclair, F-ino Patricia C., Methil, Britujo.

75 Souter, S-ro James F., London, Britujo.

76 Westmancote, S-ro W.F., Bristol, Britujo.

77 Andresen, S-ino Hilikka-Liisa, Fredericia, Danlando.

78 Andresen, S-ro Søren, Fredericia, Danlando.

79 Hansen, S-ro E., København, Danlando.

80 Hansen, S-ro Holger, Holbaek, Danlando.

81 Hou, S-ro C.H., Hillerød, Danlando.

82 Jahn, S-ro C.J., Brønshøj, Danlando.

83 Rasmussen, S-ro H.V., Brede, Danlando.

84 Riisbjerg, F-ino Gudrun, København, Danlando.

85 Vaarst, S-ro Emil, Vejgaard, Danlando.

86 Bastien, Generalo, Paris, Francujo.

87 Borel, S-ro Emile, Arles-sur-Rhône, Francujo.

88 Llech-Walter, S-ro R., Perpignan, Francujo.

89 Bepperling-Wolff, S-ino A., Wetzlar, Germanujo.

90 Bettges, S-ro Johann, Duisburg-Meiderich, Germanujo.

91 Frick, F-ino Käthe, Wiesbaden, Germanujo.

92 Jacobsthal, S-ro Alfred, Rendsburg, Germanujo.

93 Kind, S-ro Ernst, Bonn, Germanujo.

94 Pilhofer, S-ro Otto, Nürnberg, Germanujo.

95 Radermacher, S-ino Hedwig, Recklinghausen, Germanujo.

96 Abascal Fernández, S-ro Franc., Sevilla, Hispanujo.

97 Pastor-Zarraonandia, S-ro A., Bilbao, Hispanujo.

98 Costantini, S-ro L., Milano, Italujo.

99 Hercegov, S-ro Obrad, Odžaci, Jugoslavio.

100 Kačarević, F-ino Dušanka, Beograd, Jugoslavio.

101 Majcenović, S-ro Mijo, Zabno, Jugoslavio.

102 Novljan, Prof. Frano, Zagreb, Jugoslavio.

103 Vujnić, S-ro Rade, Banja, Luka, Jugoslavio.

104 Mair-Bevel, S-ino Alice, Vancouver, Kanado.

105 Blokpoel, S-ro H.J., Rotterdam, Nederlando.

106 Delden Szn., S-ro Mag. P. van, Deventer, Nederlando.

107 Douglas, S-ro H.F.K., Rijswijk, Nederlando.

108 Laverman, F-ino A.A., Leeuwarden, Nederlando.

109 Luyke, S-ro H.C., Katwijk aan Zee, Nederlando.

110 Ravestein-Basters, S-ino J.M., Den Haag, Nederlando.

111 Slot, S-ro R., Zeist, Nederlando.

FONDAJO ZAMENHOF

Antaŭa sumo : 17.388,52 gld.

Helmuth Gerbert, Aŭstrujo 1.45 gld.;
S-ino Barbara Tribe, Britujo 5.30 gld.;
Knud J. Hansen, Danlando 9.55 gld.;
Grupo Thiers 38.50 gld., S-ino Vincent 7.70 gld., Francujo; Esp. Grupo Welper 13.32 gld.; Erich Richter 2.79 gld., Franz Schneider 23.— gld., Germanujo;
Vicente Marin 3.15 gld., Juan Figuera 3.15 gld., Hispanujo; "Interstena Kaso" 4.— gld., Italujo, Banko R. Mees 100.— gld., N.N. en V 25.— gld., Nederlando;
Prof. T. Macovei 5.— gld., Rumanujo;
George P. Parker 45.88 gld., Alex Wesser, 4.90 gld., Usono.

Entute 17.681,21 gld., je 1.1.1960.

Donacu unu milonon — aŭ pli ! —
de viaj jaraj enspezoj por tiu ĉi gravega celo ! Ankoraŭ ne ĉiuj elspezoj por la Zamenhof-Jaro estas kovritaj..

DONACO AL GENERALA KASO

S-ro R. Barta, Usono 4.26 gld.

DONACO AL A.P.O.

S-ro Stanisław Svislak, Pollando 1.55 gld.

Al ĉiuj donacintoj tre koran dankon.
M. H. Vermaas, Direktorino C.O.

KOREKTO

Bedaŭrinde, sur pp. 19-20 de Jarlibro II 1959 aperis eraraj adresoj de tri komitatanoj. La ĝustaj estas jenaj :

Kühlmann, G., Løvetandsvej 31, København BRH, Danlando. Tel. 600702.

Lange, O.C., Giesegaardsvej 33, Hvidovre, Danlando. Tel. (01) 782073.

Smith, Norman R., 75 South Ealing Road, London W. 5, Britujo.

ANONCETOJ

Londona gastejo, agrabla loĝloko. Lito kaj matenmanĝo po 14 ŝ. 6 p. por ĉiu nokto. Prezoj malaltiĝas laŭ loĝdaŭro. Oni parolas Esperanton kaj la francan. D. Bytheway, "Flat Four", 1, Warrington Crescent, LONDON W. 9, Britujo. Telefono CUNningham 4487.

Pola geedziga oficejo "Swatka" havas kiel celon (speciale por geesperantistoj) feliĉege helpi al soluloj kaj diskrete kunigi esperantistajn geedzojn. Skribu al: "Swatka", Łódź, str. Piotrkowska 133, Pollando. Aldonu eble rpk.

Famekonatan francan brandon KON-JAKO disvendas s-ano Despeyroux, reprezentanto, 200 rue du Fg Saint-Denis, Paris 10^e. Aŭtentikeco kaj altkvalito garantiataj. Senpera ekspedo ekde la produkto en ĉiujn pagipovajn landojn. Informpetu!

Belga Turista Servo: Ĉian informon turistan prizorgas R. Loeckx, Konijnenperken 109, Bruselo 17, Belgujo, kontraŭ respondkuponon.

40 Geknaboj de 12 ĝis 15 jaraj deziras korespondi kaj interŝanĝi kun tuta mondo. Skribu al instruisto: Géza Gyurkovits, Budapest, 4ker. ŭpest Némethy u. 7, Hungarujo.

Letervesperon aranĝos junulara Esperanto-grupo en majo 1960. Adreso: Esp.orakköv Budapest Ŭpest Erzsébet u. iskola, Hungarujo.

En Epernay, okazos letervespero je la 23-a de februaro. Skribu grandnombre al la ĉi-suba adreso per poŝtkartoj. Ni nepre respondos. Adreso: Groupe Esperantiste, Ancien Collège rue du Docteur Verron, Epernay, Marne, Francujo.

Letervespero. Multnombra tre vigla Esperanta rondeto aranĝos komence de marto 1960 letervesperon. Vi havos eblecon akiri novajn gekorespondantojn de diversaj profesioj kaj aĝoj. Ni certe respondos al ĉiuj. Skribu amase leterojn aŭ poŝtkartojn al: Dum osvĕty,

Esperantský kroužek, Jihlava, Žižkova 15, Ĉeĥoslovakujo.

Poŝtmarkajn novaĵojn deziras interŝanĝi S-ro Harry Khel, Pivonková 2124, Praha 10, Ĉeĥoslovakujo.

Esperantistoj atendas viajn leterojn. Skribu al: Grupo de Esperantistoj ĉe Koop. Klubo en Jelena Góry, Plac 15 Grudura 28, Pollando.

Deziras korespondi pri diversaj temoj, precipe pri eduko aŭ lernejoj aferoj, ankaŭ per INTERSTENO pli volonte, kaj interŝanĝi p.m. instruisto S-ro Masao Kakuo Moriyama-mati (Toyama-ken) Takaoka, Japanujo.

Deziras interŝanĝi bildkartojn kun belaj vidaĵoj de ĉiuj urboj el la tuta mondo. S-ro Christóbal Fernández Herrera, Isla 6, Jerez de la Frontera (Cádiz), Hispanujo.

Deziras interŝanĝi gramofondiskojn kaj kompletajn seriojn de neuzitaj poŝtmarkoj kontraŭ gramofondiskoj kun ĉiuj landoj precipe Meksikio, Hispanujo, Italujo. Petar Nikolovski, Dj. Djakovića 5, Kumanovo, Jugoslavio.

Grandan letervesperon ni aranĝos komence de aprilo 1960. Sendu el ĉiuj landoj bele afrankitajn leterojn, bildkartojn kaj diversajn presaĵojn. Esperanto-Grupo ĉe WDK, str. Zwyciestwa 103, Koszalin, Pollando.

Grupe korespondus gekursanoj. F-ino Correy, 20, rue Bersot, Besançon, Francujo.

Sopire serĉataj por grava instanco! UEA-Esperanto jarkolektoj 1939, 40, 41, 42, 46; IEL-Esperanto Internacia, jarkolektoj 1937, 40, 41, 42, 43, 45. Rekomencote laŭeble per porfilateliaz valoraj neuzitaj italaj poŝtmarkoj. Prof. Konrado Ĉerri, Poŝtkesto 159, Biella, (Verĉelli), Italujo.

S-ro Rafael Mere, Str. 6 Agosto, 2 Gijon, Hispanujo, deziras korespondi kun folkloraj sakfajfilaj ludistoj en la tuta mondo, esperante, angle, france aŭ hispane.

Mi interŝanĝas poŝtmarkojn kaj cigar-ringojn. José Vallina, Mandobide, Bilbao, Hispanujo.

La Norda Lumo, Tromsö, Norvegujo, aranĝos letervesperon 5 aprilo 1960. Garantias respondon. Skribu al: Espero, Mellomvegen, Tromsö.

Instruisto 37-jara, alta 1.78 m., deziras fondi internacian familion; korespondus kun bela fraŭlino, morale kaj fizike sana. Foto redonota. Ferruccio Strocì, Pegli Lido la-5-, Ĝenovo, Italujo.

Kontakton kun geinstruistoj instruantaj la anglan lingvon al 10-12 jaraj infanoj (temo: korespondado inter la infanoj) deziras Søren Andresen, Friggsvej 10, Fredericia, Danlando.

Mi korespondas kun ĉiu interesulo, precipe kun lingvano ne apartenanta al la hind-eŭropa lingvaro, pri: kio en E estas facila por vi, kio ne! Kio plaĉas al vi, kio ne! Ĉio rilate al strukturo, gramatiko, afiksaro, vortmaterialo kaj formado ktp. Atentu mian jubilean anoncon en jarlibro 1959, p. 332! H. Dresselhaus (Brockmann) en Schloss Holte, Westf., Germanujo.

Subtenu Esperanto-agadon en Leuven. Petu informojn en Esperanto pri tiu fama universitata urbo; skribu al: Toerisme, Stadhuis, Leuven, Belgujo. **Deziras korespondi** kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiu lando S-ino Jansen-Morlag, Tijgerstr. 39, Eindhoven, Nederlando.

En Varsovio okazis dum la 44-a kontraŭtabakisma kunveno. Oni petas la prezidanton kaj la sekretarion informi ion pri postaj aranĝoj por la afero al la aranĝinto Alpo Suomalainen, Puumala, Finnlando.

Esperanto-Civito, 14B Castle Avenue, Dover, Britujo, invitas ĉiujn emeritulojn, nelaborulojn ks, fari Dovron centro de vivado. Fonduso (por aĉeti unuan domon) staras je £ 12.2.10. Vin turnu al "Dovra Soleo".

JUBILEA MEDALO DE ZAMENHOF

Arĝenta medalo en skatolo 24.— gld. (96 steloj) (Vidu ĝian bildon sur paĝo 154 de la sept. no. de "Esperanto" 1959).

MENDU ĜIN ĈE U.E.A.

La plej fama verko de

IBSEN: PEER GYNT



Drama poemo kun komentario kaj tri norvegaj popolfabeloj.

El la norvega lingvo tradukis E. A. Haugen

Prezo: bind. 8 gld., broŝ. 6,30 gld

Eldonis: ELDONA RONDO, boks 109, Trondheim, Norvegujo.

Mendu ĉe UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Eendrachtsweg 7 — Rotterdam-C. — Nederlando

KONSTANTA EKSPOZICIO EN MONTROFENESTRO

jam unujara, kiu donas novan programon dufoje en ĉiu monato, deziras turismajn kaj komercajn reklamojn — bildkartojn de naciaj kostumoj — bildkartojn indiĝenajn — fotojn de klasoj el lernejoj kiuj studas Esperanton — ankaŭ fotojn de kursoj kiuj studas Esperanton.

Sendu al S-ro N. G. NILSSON, Stampg. 8, GÖTEBORG, C., Svedujo.
Respondas al ĉiu.

Farmaciisto Juljan Blajman (Ben-Ŝalom), redaktas monatan revuon

"LA FUNDAMENTOJ DE POPOLA SANO",

serĉas ĝeneralajn agentojn nacilingvajn en diversaj landoj por sia revuo, praktikaj patentoj kaj artikoloj. Skribu laŭ adreso: **Kemiisto Blajman Ben-Ŝalom**, Revadim str. 1, Ramat Haĥajal, Tel Aviv, Israelo.

STAFETO

En la kadro de la



Zamenhofa Jaro

kontribuis la ok jenajn originalajn brikojn al

la konstruado de nia propra kulturo

BAGHY Songe sub pomarbo	AULD Esperanta Antologio	BQULTON Eroj kaj aliaj poemoj
WARINGHIEN Lingvo kaj Vivo	SEKELJ Nepalo malfermas la pordon	
ROSSETTI Pinta krajono	TELL La bela subtera mondo	RAGNARSSON Ŝtupoj sen nomo

Preskaŭ 2300 paĝoj
Pli ol 100 bildoj, pluraj eĉ koloraj
Dekoracioj de Picasso, Klee k. a.

Teatro, poezio, lingvistiko, esperantologio,
geografio, speleologio, movado
konsistigas la ĉefajn subjektojn de la libroj

Kunhelpu pluporti la torĉon!

J. RÉGULO · ELDONISTO · LA LAGUNO · KANARIOJ

En la printempo 1960 aperos belega

Memorlibro

pri la

Zamenhof - Jaro

Elstaraj artikoloj, resumo de la tutmondaj celebradoj, riĉa fotomaterialo.

Elegante bindita.

LA UNUAJ CENT EKZEMPLEROJ de la Memorlibro estos numeritaj kaj portos la subskribojn de la Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario de U.E.A., samtempe la Prezidanto kaj Sekretario de la Internacia Organiza Komitato.

Prezo de tiu **unikajo**: 25.— gld. (100 steloj).

Kiu deziras unu el tiuj ekzempleroj kaj jam pagis por ordinara ekzemplero, povos alpagi.

Atentu! La Antaŭmenda prezo de 9.— gld. validos unu plian monaton, do: ĝis la 1-a de marto 1960.

RAPIDU MENDI ĈE U.E.A.!

KONKURSO pri 500 Germanaj Markoj por ĉiuj klientoj kaj amikoj de Esperanto — Filmo — Germanujo en la tuta mondo

- | | |
|---|---------------|
| 1. premio : Subvencio de 150 GM por vizito de la UK en Bruselo aŭ kontanta mono | 150 GM |
| 2. premio : Subvencio de 90 GM por la UK aŭ kontanta mono | 90 GM |
| 3.—5. premioj : Biletoj por EFG-produktoj valoraj po 25 GM | 75 GM |
| 6.—10. premioj : Biletoj por po du EFG-diskoj laŭ libera elekto | 75 GM |
| 11.—20. premioj : Biletoj por po unu EFG-disko laŭ libera elekto | 75 GM |
| 21.—30. premioj : Po unu libro valora 3,50 GM | 35 GM |
| | entute 500 GM |

Kondiĉoj

Rajtas partopreni ĉiuj klientoj kaj amikoj de EFG, kiuj aĉetos en la tempo de 10.1.1960 ĝis 15.4.1960 minimume unu EFG-diskon (n-ro 1, 2 aŭ 3) por nur 7,50 GM. Al ĉiu disko estos aldonata partopreno-raĵtigilo.

EFG-kunlaborantoj ne rajtas partopreni. Sendfino: 1.5.1960. Solvoj, kiuj portos la poŝt-stampon de tiu-ĉi tago, ankoraŭ estos konsiderataj; el neeŭropaj landoj nur, se ili estos sendataj per aerpoŝto.

ESPERANTO FILMO GERMANUJO
Rudi Biernath, Ackerstr. 53
Braunschweig, Germanujo

Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam

